

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Kulturdiplomato
Arvydas Juozaitis
gastas en “La Ondo”

Simpozio pri lingvaj
rajtoj en Ĝenevo

Vojaĝu per la trajno
“Zamenhof”

Ronda Tablo: opinioj
pri la jubileanta UEA

Zamenhof, la unua
Esperanto-ĵurnalisto

La Sukcena Lando (11)

Nia trezoro: “Parnasa
Gvidlibro”

James Joyce. “Evelino”

La 11^a Fotokonkurso



Junio
2008

№6

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2008. №6 (164)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2008

Internacia tarifo: 32 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 18 eŭroj

Ruslanda tarifo: 390 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la paĝo 27 de la februara kajero.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 750 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (2000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1200 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (700 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (400 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto "avko-u" ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2008.

"La Ondo de Esperanto" (Волна эсперанто). 2008, №6 (164).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 20 мая 2008 г.

Цена свободная. Тираж: 750 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Intervjui jubileanton estas rutina tasko ĵurnalista, kaj oni kutime prezentas la vivovoĵojn de la eminentulo, ties ĉefajn atingojn, unu-du amuzajn epizodojn por malpezigi la tekston kaj, fine, demandas pri la planoj. Ricevinte la taskon de la eldonanto de *La Ondo* intervjui ties redaktoron, mi prokrastis ĝin, ŝvitante pri aliaj tekstoj, korespondante kun aŭtoroj, pretigante bildojn, grumblante pri komputilproblemoj ktp. Fine, mi devas intervjui la kvindekjarigantan redaktoron, do min mem, tute lastaminute. Nu, mi antaŭvidis tion kaj petis niajn legantojn sendi demandojn rete. Feliĉe, neniu scivolis pri formalaj biografiaj, supozeble konataj aŭ neinteresaj, do mi ne sekvos la rutinan skemon kaj respondos libere, sen citi la demandojn.



Jen do la plej neredaktita teksto ĉi-numera.

Mi ne memoras, kion mi (mal)ŝatis en Esperanto, kiam mi eklernis ĝin. Logis min la grandioza ideo uzi elpensitan lingvon por korespondi tutmonde, kaj la instrumento mem malgravis por mi. Tamen la proponitaj uezbloj ne estis altinspiraj. Preskaŭ ĉiuj enlandaj esperantistoj uzis la lingvon por babili kun samlandanoj en tendaroj kaj kluboj kaj por korespondado sen-tema. Mi ektediĝis kaj mi forlasus la tuton, se hazarde mi ne trovus en la kluba biblioteko, inter amaso da fatraso, *Literaturan Foiiron*. Iom post iom mi trovis samideanojn inter la samlingvanoj; por ni Esperanto estis ne tendarlingvo, sed kulturlingvo. La sekvon vi scias.

Kiuj influis min tiutempe? Nikolai Lozgaĉev, Aleksej Birjulin, Viktor Kloĉkov kaj, certe, Halina. Kaj poste? Tre gravis la korespondado kaj renkontiĝoj kun Nikolaj Faddejeviĉ Danovskij, kun Bill Auld, kun Ryszard Rokicki, kun Alen Kris, kun Osmo Buller, kun Paŭlo Jegorovas...

Ne, mi ne timis forlasi la bone pagatan laboron en *Gazprom* favore al malforta metio esperantista. Post la vizito de Roterdamo kaj Antverpeno en 1991 ni komprenis, ke Esperanto povos esti nia profesio, kaj tiel estas jam dum pli ol 16 jaroj. Sed mi ne rakontu pri mia laboro. Vi bonege konas ĝin, simple ĉar vi ja legas niajn librojn kaj *La Ondon*.

Ŝatoj kaj preferoj... Same kiel multaj redaktoroj, mi preskaŭ ne legas por mia propra plezuro. Mi jam respondis en Vkontakto.ru. Mi kopias de tie la nomojn: Avvakum, Dostojevskij, Ĉeĥov, Sologub, Solĵenicin, Ĥlebnikov, Paviĉ, Jerofejev, Borges, Chesterton, Dürrenmatt, Vian, Waringhien, Auld, Camacho. Stranga listo, ĉu ne? Mi televidas nur biatlonon kaj futbalon. Ne spektas filmojn. Ne vizitas teatrojn. Ŝatataj landoj? Bjelorusio, Slovakio, Litovio kaj Skotlando. Ĉinion mi ŝatus viziti. En mia plej ŝatata urbo mi nun loĝas. Dankon! donacu ĝin al *Amiko* aŭ *Ilaro*. Mi estas rusortodokso. Nur unu deziro? Ke Halina estu sana. La plej ŝatata renkontiĝo? Arkones. Ne membras en la Civito. Neniu posteno en la movado, sed eble poste... Mi ne estas Komitatano Z! Ne havas dombestojn, aŭton, kravaton. Neniam voĉdonas. Kolektas nenion. Neniu Esperanto-kanton konas parkere.

Dankon pro la gratuloj. Ĝis novaj jubileoj!

AlKo

Ĉi tiun kajeron unue ricevos partoprenantoj de la ĵurnalista kongreso en Vilno. Bona okazo por aperigi foton pri Litovio de Jean Marin (kovrilpaĝo) kaj foton *Reveno al la hejmo* de litova esperantisto Gediminas Kazlauskas (dorspaĝe).

Nia gasto: kulturdiplomato Juozaitis

Arvydas Juozaitis, kulturataŝeo de Litovio en Kaliningrado, naskiĝis en 1956 en Vilno. Finis la Vilnan universitaton en 1980, doktoro de filozofio. Naĝisto, bronza medalisto en la 21a Olimpiko en Montrealo (1976). Aŭtoro de 17 libroj: unu romano, du novelaroj, 12 teatraĵoj, pluraj el ili estas surscenigitaj.

Kial Vi — sportisto, filozofo, verkisto — elektis diplomation?

Preskaŭ hazarde. Post la oficado kiel konsilisto pri kulturo, sporto, turismo kaj religio ĉe la ĉefministro Brazauskas, mi ekinstruis filozofion en la Vilna universitato. Post unu jaro mi eksentis, ke tio estas tro malvasta agado-kampo por mi. Mi ricevis proponon reprezenti la litovan kulturon en Berlino, sed mi rezignis, ĉar la germana kulturo estas fremda por mi. Kiam estis kreita la posteno de ataŝeo pri kulturo en Kaliningrado, mi konsentis. Unue, mi tre ŝatas Kaliningradon, kaj due, temas pri interesa posteno. Ĝi apartenas al la ministerio de kulturo, kaj la ministerio de eksteraj aferoj ne enmiksiĝas en mian agadon. Mi do estas ne diplomato, sed “diplomato”, aŭ, pli ĝuste — kulturdiplomato.

Filozofio por mi ne ĉefas, pli gravas kreado. Ĉia kreado, sed precipe literaturo. En Kaliningrado mi verkis libron, kiu havis jam tri eldonojn.

Kio do estas via laboro?

Mi okazigas en Kaliningrado ekspoziciojn kaj koncertojn, venigas prelegantojn al la universitato. Foje estas inversa agado, ekzemple, komence de majo en la litovia havenurbo Klaipėda okazis tago de lingvoj kaj libroj. Mi venis tien kun la kaliningradaj poetoj.

Antaŭnelonge okazis prezentado de Litovaj noveloj de la orient-prusa verkisto Hermann Sudermann, eldonita ankaŭ danke al vi. Kion signifas tiaj kulturaj iniciatoj?

Temas pri vastigo de horizonto por Kaliningrado. Oni devas pli firme konscii, ke la historio de Kaliningrada regiono komenciĝis ne post la Potsdama konferenco. Tiu ĉi teritorio estas unika laŭ sia kultura pasinteco kaj eblecoj... Povas malaperi la materia kulturo, sed ne la spirita kulturo. Kaliningradaj verkistoj konsentas kun tio. Nun ili malfermis sian “samlandanon” Sudermann. Li verkis pri tiu ĉi spaco, pri la vivo en ĝi. Tio iĝas tre interesa kaj grava.

Kio amuzis vin ĉi tie?

En mia libro *Reĝurbo sen reĝoj* mi priskribis la diskuton pri la blazono de Kaliningrada regiono en la Socia Ĉambro. Rerezentantoj de diversaj grupoj esprimis sian rilaton. Komence en la projekto estis unu flugilo, kaj

precipe la unuflugilecon diskutis la inteligencio. Estis amuze vidi, kiel homoj deziras trovi iujn radikojn, ĉar blazono estas radiko, radiko de konscio, simbolo de simboloj. Estis diversaj elpensadoj pri prusoj, Puŝkin, Ŝeremetjev ktp., estis ankaŭ ligo kun la germana pruseco kaj kun paganismo. Aŭskulti tiujn opiniojn estis tre amuze. Kvankam inter la absurdaĵoj estis kelkaj profundaj pensoj, absurdaĵoj estis pli multaj.

Vi menciis vian libron *Reĝurbo sen reĝoj*. Kiel Vi rilatas al Kaliningrado?

Tre pozitive. Ĝi estas unu el la plej interesejaj urboj de Eŭropo. Nenie aliloke ĉio tiel ŝanĝiĝis postmilito, kaj samtempe ĉio restis samloke. Jen la aŭdaco kaj deziro de la loĝantaro restarigi la vivon, konstrui ion kaj resti ruslanda, sen forĵeti la antaŭmilitan kulturon. Tre interese. Kaj rezultodone. Ja ni vidas, kiel ĉio pliboniĝas, la urbocentro estas tute eŭropa kun forta ruslanda kaj rusortodoksa kontribuo. Mi vidas la vivon kiel verkisto, ne kiel diplomato, kaj min interesas la vivo kaj la ŝanĝoj, mi estas ĝoja pri la neperforta evoluo.

Mi ofte vizitis Kaliningradon. La ĉefa impresado dum la sovetunia periodo estis grizo kaj ia senkoloreco. Ankaŭ sur la homaj vizaĝoj. Mi volis scii, kion oni kreas ĉi tie. Sed nur en la drama teatro ni povis ion trovi. Ni ŝatis ĝin, en ĝi estis vera rusa kulturo, ia rebrilo de Moskvo, io de Stanislavskij. Kaj ĵazo. Kiam oni diris “Kaliningrado”, tio tiutempe estis filharmonio, ĵazo kaj Aleksej Kozlov.

Mi ĝojas, ke pro la grandegaj ŝanĝoj la vivo ekfloris. Eble sen la najbaroj kaj la fakto, ke Kaliningrado situas en la centro de Eŭropo, la ŝanĝoj ne okazus. Ankaŭ Ruslando estas interesita pri la transformiĝo. Eĉ la nomo Kenigsbergo iĝis nedanĝera en la nuna Ruslando.

Timigas min nur, ke ankaŭ ĉi tie povas enradikiĝi islamo. Ĝi estas fremda. Ĉu Ruslando sukcesos ĉi tie defendi eŭropajn, kristanajn radikojn? Kaliningrado estas kiel lakmusa papero. Sed eble tio estas ia eŭro-azieco, mi ne scias...

Ĉu la rusa lingvo por Vi estas fremda?

Jes, fremda, sed ĝi estas mia dua lingvo. Mi eĉ verkas en ĝi. Ekzemple, en la *Antologio de kaliningradaj noveloj*



Foto de Olga Šipovalenko

(2007), kun verkoj ekde postmilitaj verkistoj ĝis la nuntempaj, mia rakonto estas la lasta.

Kio pri aliaj lingvoj, ekzemple: Esperanto kaj la angla?

Dum la preparado de la 90a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno mi havis renkontiĝojn kun Povilas Jegorovas, kaj mi faris raporton pri tio al la ĉefministro. Tiam Esperanto ekinteresis min.

En la kultura sfero pri nenio eblas diri, ke tio aŭ alio estas finita aŭ finfarita, ĉio povas ripetiĝi. Intereso al Esperanto povas restarigi, ricevi impulson, precipe, se la angla kulturo, la angla lingvo iĝos pli totalisma. Ĝi estas totalisma lingvo; kiam vi aŭdas ĝin, vi konstatas, kiom ĝeneralaj en ĝi estas konceptoj kaj esenco de vortoj. En mia rusa lingvo estas flueco, sed en la angla tio mankas, okazas simpligo. Interkomunikiĝante, vi simpligas la anglan lingvon, ĉar multaj konas ĝin malbone, kaj vi devas adapti sin al la malpli bona lingvokonanto. Vi mem aŭtomate malriĉigas vin.

Kiel esperantistoj povus kontribui al la dialogo inter niaj landoj?

Esperantistoj devas interkomunikiĝi. Necesas viziti unu la alian. Simple viziti.

Fine, pri viaj planoj...

La plej proksima — *Steloj super Nemano*, litova muzika-poezia vespero kun partopreno de koruso. Tiaj aferoj realiĝas per natura maniero, ĉar estas homoj, kiuj deziras plenumi tion. Mi investas multan energion por tio, sed mia koro kuŝas aliloke, en kreado, en literaturo... Aŭtune finiĝos mia deĵorperiodo en Kaliningrado. Mi ne planas forveturi malproksimen. La balta-slava areo allogas min; mi proponis la terminon “Baltoslavio”, kaj ni komencis eldoni dulingvan (litovan kaj rusan) revuon.

Pri lingvaj rajtoj en Ĝenevo

24 apr okazis en la Ĝeneva sidejo de Unuiĝintaj Nacioj simpozio pri lingvaj homaj rajtoj, dediĉita al la 100-jariĝo de UEA kaj la 60a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Unuafoje simila simpozio okazis antaŭ dek jaroj. Memorigante pri la iama traktado pri Esperanto ĉe Ligo de Nacioj en la sama loko, Palaco de Nacioj, prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta atentigis: “En ĉi tiu loko Francio iam metis sian vetoon kontraŭ Esperanto. Eble Privat nun kontentus pri ni”.

Bondezirojn por la simpozio sendis la ĝenerala direktoro de la Ĝeneva Oficejo de UN, s-ro Sergio A. Ordzonikidze, kiu menciis i.a.: “UEA faras signifan kontribuon al la antaŭenigo de lingvaj rajtoj en la mondo, precipe pere de sia aktivado subtene al la rajto uzi kaj esti edukata en sia propra gepatra lingvo”.

En la programo post salutparoloj estis pluraj prelegoj de eminentaj specialistoj. D-ino Tove Skutnabb-Kangas (Universitato de Roskilde, Danlando) prelegis pri “Lingvo, edukado kaj (rompo de) homaj rajtoj”. Ŝi aparte emfazis la lingvan rajton de infanoj ricevi edukon en sia gepatra lingvo, kaj la genocidajn situaciojn, kiuj ekzistas, kiam oni praktike devigas la infanojn de difinita popolo transiri al alia lingvo. La temo de prof. François Grin (Universitato de Ĝenevo) estis “Interkompreniĝo kiel strategio por lingva justeco”. Li pritraktis modelon, pri kiu li nun laboras, por utiligi la interkompreneblecon inter lingvoj de la sama grupo en Eŭropo por malpliigi la traduk-kvanton kaj samtempe garantii al ĉiu servon en lingvo, kiun li/ŝi povas facile kompreni. Kunlaboranto de Grin, d-ro Michele Gazzola, prelegis pri “Instruado en universitatoj: la lingvaj gajnoj kaj malgajnoj pro internaciismo”. Kiel reprezentantoj de indiĝenaj popoloj en Kolombio, Alasko kaj Ĉilio, pri ties situacio parolis respektive John Mateo Lopez, ambasadoro Ronald Barnes kaj Flor Rayen Calfunao Paillalef.

Inter ĉ. 70 partoprenantoj el 13 landoj proksimume duono estis neesperantistoj el diversaj NRO-j. Rimarkinda estis la ĉeesto de klaso de gejunuloj el svisa mezlernejo, sub la gvido de sia instruistino Mireille Grosjean.

Financan subtenon por la simpozio UEA ricevis de Svisa Esperanto-Societo kaj Institucio Hodler ‘68.

GK UEA

Malferma tago en jubilea etoso

La 28a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 26an de aprilo estis markita de la centa datreveno de la fondo de Universala Esperanto-Asocio. Ĉi-foje ĝi nature estis aranĝita en la sabato plej proksima al la fondotago de UEA, la 28a de aprilo. Entute 125 vizitantoj el 19 landoj plenigis la UEA-domon.

Oni aŭdis du prelegantojn.

La prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta titolis sian prelegon “Historio por malfermi la estontecon”, omaĝe al la simbola signifo por nia kulturo de la samtitola ĉina-japana-korea komuna verko pri la konflikta historio de la regiono.

D-ro Ziko van Dijk faris du-partan prelegon pri “UEA tra la tempoj” ordigante sian riĉan materialon per sinsekvo de ĉapitroj kaj demandoj pri la klopodoj konstrui mondskalan tegmenton por la Esperanto-movado.



Plene konkeris la publikon Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer el la kantogrupa *Kajto*, kiuj donis du unuhorajn koncertojn. La programeron “TEJO sin prezentas” prizorgis Gregor Hinker, prezidanto de la junulara sekcio de UEA, kun la TEJO-volontulino Julia Noe. Aldone al la tradicia senpaga loterio TEJO aranĝis skriban kvizon, kies respondojn oni devis serĉi dise tra la domo. Okazis prezentoj de novaj eldonaĵoj por vekti apetiton por butikumado en la libroservo. La pinta titolo de la tago, kun 21 venditaj ekzempleroj, estis la freŝe aperinta *Ksenofobia gvidlibro al la nederlandanoj*. La vendoj sumiĝis entute je 3135,87 eŭroj.

En la vespero la Estraro de UEA invitis la stabon de la Centra Oficejo, kelkajn eksoficistojn kaj aliajn gastojn al jubilea bankedo. Kiel honora gasto partoprenis s-ino Birthe Lapenna.

GK UEA

La Estraro kunsidis laborece

La Estraro de UEA, elektita en la Jokohama UK, 27–29 apr kunsidis en la Centra Oficejo. Krom la sep estraranoj ĉeestis, parte aŭ tuttempe, la Ĝenerala Direktoro, redaktoro de *Esperanto*, Konstanta Kongresa Sekretario, kaj observantoj de TEJO kaj ILEI. Ili kunsidis preskaŭ 30 horojn, finante sian laboron en la tria tago iom antaŭ la noktomezo.

Grandan parton de la tempo prenis preparoj por la kunsidoj de la Komitato en la ĉi-jara UK. Por la dua sinsekva jaro la el-kaj enspezoj de la Asocio estis praktike en ekvilibro. Same kiel la buĝeto por la nuna jaro, ankaŭ tiu por 2009 estas plene ekvilibra malgraŭ enkalkulita dungo de plia oficisto. La Estraro tamen konscias, ke por konservi tiun bonan staton necesos daŭra aktiveco sur la financa kampo. Pro tio la financa estrarano Loes Demmendaal prezentis planon pri enspezigaj agadoj, kiun la Estraro baldaŭ definitivigos.

La Estraro decidis pri honorigoj, diplomoj kaj premioj, publikigotaj dum la UK, kaj nomumis 52 ĉefdelegitojn por 2008–2010. Oni konfirmis la konsiston de la Loka Kongresa Komitato de la 94a UK en Bjalistoko (2009) kun vicurbestro Aleksander Sosna kiel ĝia prezidanto. Al la eldonserio *Oriento-Okcidento* estis akceptita la klasika ĉina majstroverko *Romano pri Tri Regno*. La 24a ARKONES en Poznań (19–21 sep 2008) ricevis aŭspicion de UEA.

GK UEA

TEJO serĉas volontulon!

TEJO invitas kandidatojn por la posteno de plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo. Esti volontulo ne nur signifas grave kontribui al la bonfarto de TEJO, sed samtempe signifas spertan pliriĉiĝon, ne nur personan sed certe ankaŭ movadan.

La TEJO-volontulo ankaŭ dum kongresoj kaj TEJO-seminarioj estu la vizaĝo de la organizo, informante al membroj kaj aliaj interesatoj pri agado, aranĝoj, servoj ktp. de TEJO. La volontulo tiel kontribuas al la videblo de TEJO dum kongresoj, kaj samtempe liberigas iom da tempo de la estraranoj.

La volontulo devas preti labori dum 12–18 monatoj kiam la periodo de volontulado de la nuna TEJO-volontulo finiĝos, do ekde 1 nov 2008. La limdato por kandidatiĝi estas 15 sep 2008.

Julia Noe

TEJO-volontulino

Trajno Zamenhof

Danke al la afabla helpo de la direkto de la regiona trajnkompanio en Bjalistoko, laŭ la propono de la urbestro de Bjalistoko, kun la financa subteno de la marŝalo de la Podlaĥia Vojevodio, en la somera horaro ekestos nova trajno *Zamenhof*.

La 1an de junio 2008 ĝi la unuan fojon startos de Bjalistoko al Bielsko-Biała. Sur la kajo, apud la trajno, je 06h05 okazos solena “bapto”, kaj poste la adiaŭo de la trajno kaj de Ludoviko kaj Klara Zamenhof, kiuj kuracocele forvojaĝos “al akvoj”.

Survoje, en la Centra Stacidomo de Varsovio kaj en Katowice salutos la familion Zamenhof esperantistoj atendantaj sur kajoj. En Bielsko-Biała gesinjoroj Zamenhof renkontiĝos kun la honora komitato, kiu sub la gvido de la eŭrop-deputito Małgorzata Handzlik atendas ilian alvenon. Posttagmeze ĉiuj partoprenos la feston okaze de Internacia Tago de Infano, reklamos Esperanton kaj la naskiĝurbon de Ludoviko Zamenhof.

Pri la vestaro el la epoko por la familio Zamenhof zorgos la dramteatro en Bjalistoko. En la trajno estos disdonitaj flugfolioj pri Esperanto kaj Bjalistoko. Per la trajna radio Ludoviko rakontos al vojaĝantoj pri la ideo kaj la lingvo universala. La evento okazos sub la media protekto de TV Białystok kaj de la televidkanalo TVN.

Ĉiuj, kiuj dezirus kunorganizi la festan vojaĝon de la trajno, estas bonvenaj. Kontakto nin rete:

✉ esperanto.bialystok@interia.pl.

“Leviĝanta Bjalistoko” — jen la slogano, per kiu dum la kvar venontaj jaroj estos promociata la ĉefa urbo de Podlaĥio. Laŭ la mendo de la urbestro Tadeusz Truskolaski la firmao *Grupo Eskadra*, kiu okupiĝas pri promociado de urboj, prilaboris la strategion de la promociado de Bjalistoko.

“Temas ĉefe pri tio, ke ni deziras montri Bjalistokon kiel la urbon vivantan, dinamikan, modernan kaj substrekantan sian ekziston, kulturon kaj tradicion”, — diris la vicurbestro pri kulturo Tadeusz Arlukovicz. La strategio baziĝas sur la multkultureco de Bjalistoko. *Grupo Eskadra* vidas grandajn eblecojn de la promociado per Esperanto. Aldona argumento estas la fakto, ke en la jaro 2009 ĝuste en la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof okazos la 94a Universala Kongreso de Esperanto.

Ela Karczewska



Nankingo: grandaj reklamiloj en la ĉefstrato de la universitato (*Fotis Augusto Casquero*)

“Tamen mi lernos!”

Ĝis nun la plej granda lingva festivalo okazis en la franca urbo Tours, kun 3.600 vizitantoj. Sed superis ĝin la festivalo, okazinta 10–11 maj en la Universitato de Nankingo (Nanjing, Ĉinio) sub la gvidado de la usona esperantisto Dennis Keefe kaj de la vicestro de la Fakultato pri Aplikata Lingvistiko de la Universitato, Cui Jian Hua.

Dum la dua maja semajnfino pli ol 13 mil 500 homoj, plejparte studentoj kaj profesoroj, vizitis 260 provlecionojn de 70 lingvoj, kiujn prezentis pli ol cent instruistoj.

Esperanton prezentis la franca profesoro Michel Fontaine, la hispana Augusto Casquero, la ĉinaj Neĝeta, Peng Zhenming kaj Xia, kaj kunlaboris kun ili dudeko da ĉinaj esperantistoj.

La Festivalo en Nankingo estas monda rekordo en multaj aspektoj, sed ĉefe en la intereso vekita en la neesperanta publiko. Televidkanaloj, radioj, ĵurnaloj amplekse informis pri ĝi al milionoj da homoj en Ĉinio.

La ĉeestantoj al la prezentadoj de Esperanto (ĉirkaŭ 25 unuhoraj prezentadoj, kelkaj el ili por grupoj de lernejoj), entute ĉirkaŭ 1.500, restis vere impresitaj. Ĉ. 400 el ili decidis aliĝi al kurseto de Esperanto fine de la festivalo. La intereso atestas, ekzemple, juna partoprenantino, studentino de tiu universitato, kiu skribis al mi rete: “Mi demandis miajn gepatrojn ĉu mi povos lerni Esperanton. Ili diris ke ne. Tamen mi lernos”.

Danke al Dennis Keefe kaj Cui Jian Hua nenio mankis en la Festivalo. Promenante tra la ĉefa strato de la universitato, volontuloj en longaj vicoj portis panelojn pri la horoj kaj salonoj de diversaj prezentadoj... Oni vidis la T-ĉemizojn de la festivalo, la grandajn reklamilojn ĉe la enirejo kaj la ĉefstrato de la universitato.

Ĉu UEA kaj ILEI povus helpi, subteni kaj eĉ organizi estontajn Lingvajn Festivalojn? Ĉu ne valoras tion apogi senkondiĉe? Ĉu ni rajtas ne profiti la sperton kaj kapablon de homoj kiel Dennis Keefe kaj Cui?

Ofte niaj Esperanto-aranĝoj aspektas kiel kunvenoj de sektoj, fermitaj al ĉiuj. Sed dum la lingvaj festivaloj la informado al neesperantista publiko estas grandega. Eĉ la amaskomunikiloj montras grandan intereson, ĉar temas ne pri Esperanta aranĝo, sed pri festivalo, kie ĉiuj homoj povas multon lerni.

La universitato de Nankingo volas krei grupon da profesoroj pri la lingvoj germana, angla, franca, hispana, kiuj kapablu instrui ilin en Esperanto. Bonvolu sendi proponojn al Cui Jian Hua (cuijh2@mail.nju.edu.cn) aŭ al Dennis Keefe (keefe@lingvafest.info), kiu ankaŭ instruas en la universitato.

Augusto Casquero

Pli ol 50 mil eŭroj por EEU

Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) prezentis novembre ampleksan peton al la Eŭropkomisiona Buroo por edukado kaj kulturo EACEA (Education Audiovisual & Culture Executive Agency) okaze de konkurso *Aktiva Civitaneco*, kiu antaŭvidis financadon de funkciaj kostoj de eŭroprivelaj organizoj, kiuj kontribuas al aktiva civitaneco. La peton ellaboris provizora oficisto de EEU en Bruselo, Maja Tišljjar, kun la helpo de la sekretario de EEU.

EACEA publikigis rezultojn de la konkurso meze de aprilo 2008, kaj inter aliaj organizoj ili aprobis ankaŭ la peton de EEU pri iom mapli ol 56 mil eŭroj por funkciaj kostoj en la jaro 2008. Tio estas 80% de la planitaj kompletaj kostoj kaj la ceterajn 20% EEU devas prizorgi mem, kion ĝi faros per la helpo de sinjoro Etsuo Myoshi kaj la propraj kotizoj.

La financoj kovras la salajron de la oficisto, la kostojn de la oficejo (kiun EEU luis ekde februaro 2008 en la Domo de Internaciaj Organizoj MAI en la strato Washington en Bruselo) kaj materiajn kostojn de planitaj aktivecoj.

La unuan fojon EU financas iun Esperanto-organizon por ties funkciado kaj ekzisto. Tio estas grava paŝo sur la vojo al certagrada oficialigo de Esperanto.

Aparte necesas substreki, ke EK aprobis financadon nur al 36 eŭroprivelaj organizoj inter pli ol 300 petintaj.

Zlatko Tišljjar



Essen: La estraro de GEA: (de maldekstre) Pit Hauge (trezoristo), Wolfgang Bohr (landa agado), Christof Krick (instruado), d-ro Rudolf Fischer (prezidanto), Sebastian Kirf (varbado), Andreas Emmerich (vicprezidanto), d-ro Rainer Kurz (eksteraj rilatoj), Julia Hell (prezidantino de GEJ), Andreas Diemel (junulara agado) kaj d-ro Jörg Gersonde (membroadministrado). (Fotis Alfred Schubert)

La unua kongreso en Serbio

La unua kongreso de serbiaj esperantistoj okazis 1–4 majo 2008 en Niška Banja. Organizis ĝin Serbia Esperanto-Ligo, Serbia Instituto por Esperanto kaj la urba E-societo de Niš. La kongresanoj konstatis, ke dum lastaj jaroj la Esperanto-movado en Serbio bone laboras, sed, bedaŭrinde, inter esperantistoj estas malmultaj gejunuloj.

Dum la unua tago de kongreso, apud salutvortoj kaj prelego de Tereza Kapista pri centjariĝo de UEA, estis prezentitaj tri novaj libroj: *Vortaro Esperanto-serba kaj serba-Esperanto* de Adem Jakupović, Momčilo Očokoljić kaj Marko Petrović; la serba traduko de la rektameta lernolibro de Stano Marček; romano de Nandor Gion *Salvo al nigra bopalo* kiun tradukis el la hungara Laszlo Husar.

La duan tagon de kongreso prelegis institutanoj: Boriša Miličević pri historio de Esperanto en Serbio, d-ro Miodrag Stojanović pri utiligo de Esperanto en scienco, Zlatoje Martinov pri originala E-literaturo, d-ro Pribislav Marinović pri tradukoj de serba literaturo en Esperanto, magistro Radojica Petrović pri lernado de Esperanto rete, magistro Gvozden Sredić pri Esperanto-movado inter fervojistoj kaj Dimitrije Janičić pri E-gazetaro. Ĉiuj prelegoj aperis en la kongresa numero de *Beograda verda stelo*. Samtage en la Eŭropa Domo en la centro de Niš estis malfermita ekspozicio pri Esperanto.

La tria tago estis rezervita por konatiĝo kun la urbo, por ekskurso kaj komuna tagmanĝo en naturo.

La kongresanoj konkludis ke la temo de nova kongreso povus esti edukado de instruistoj de Esperanto kaj plijunigo de la Esperanto-movado.

Dimitrije Janičić

Meksiko adiaŭas la Civiton

Dum la kvin unuaj majaj tagoj 32 partoprenantoj el ses landoj kunvenis en la meksika urbo Aguascalientes okaze de la 9a kongreso de la Meksika Esperanto-Federacio.

La programo estis riĉenhava. Estis prelegoj pri la historio de Esperanto en Meksiko (Fidel Figueroa), Esperanto ĉe la universitato UNAM (Luis Córdova), omaĝo al komponisto kaj kantisto de infankantoj Kri Kri (Vicente Valdez Bejarano). La komisiito de UEA pri Ameriko, Maritza Gutiérrez, prezentis la agadon de la Amerika Komisiono. Ĉar la intereso de MEF estas kalkuli je novaj instruistoj, okazis trejnseminario gvidita de Atilio Orellana Rojas.

Por konatiĝi kun la loka kulturo, la ĉeestantoj partoprenis ekskursojn. La unua estis duhora perbusa veturado tra la vidindaĵoj de la bela kongresurbo. La dua estis vizito al la mondfama foiro de San Marcos.

Kadre de la kongreso okazis ankaŭ asembleo de MEF. Inter la decidoj faritaj estis la elekto de novaj estraranoj: Mallely Martínez Mateos (prezidantino), Daniel Moreno Martínez (ĝenerala sekretario), Morayma Martínez Mateos (kasistino), David López Rueda, Martha Cárdenas (membroj).

Estis ankaŭ decido ĝisdatigi la nunan statuton kaj esplori la eblecon pri la sidejo por la venonta kongreso.

Konstatinte, ke ne ekzistas pruvoj pri la supozata aliĝo de MEF al la Pakto de la Esperanta Civito, la asembleo voĉdonis kaj decidis distanciĝi el tiu organizo kaj konsideri sin neniam aliĝinta.

Daniel Moreno Martínez

[En la retejo de la Civito dume mankas komento pri la decido de MEF.]

Amika festo de Esperanto

Malstreĉa interparolado kaj bona etoso karakterizis la 85an Germanan Esperanto-Kongreson en Essen 9–12 maj 2008. Ĉirkaŭ cent partoprenantoj kunvenis sub la ĉefa temo “Malkovru viajn antaŭjuĝojn”, por diskuti pri la pasinteco, nuntempo kaj estonteco de Esperanto, kaj por ĝui bonan kulturalan programon.

La ĉefprelegon faris Gregor Hinker, kiu sprite kaj kritike prilaboris la temon de antaŭjuĝoj en rilato kun Esperanto. Sed per “antaŭjuĝoj” la organizintoj ankaŭ celis la antaŭjuĝojn kontraŭ la Ruhr-regiono kiel supozite malalloga. Tiujn antaŭjuĝojn oni povis bone forigi dum la ekskursoj al la lago Baldeney, la minejo Zollverein aŭ al la haveno en Duisburg.

Grava estis la prelego de Mramba Simba el Tanzanio — urbestro de komunumo de 14 mil loĝantoj en kvin vilaĝoj. Li prezentis evoluhelpaj projektoj en tiu loko, per kiuj la neregistara organizaĵo *Mazingira* (“medio” en la svahila lingvo) klopodas subteni la loĝantaron de Bunda, malriĉa distrikto en la nord-orienta parto de Tanzanio. La projektaro entenas konstruadon de putoj, financan prizorgadon helpe de mikrokredito, konstruadon de lernejo kaj la subtenon de orfoj. Tio estas bona ekzemplo por la internacia interhelpo subvenciita per Esperantistoj el la tuta mondo.

Tre interesa estis ankaŭ la prelego de d-ro Ziko van Dijk pri la centjara historio de UEA kaj ties rilatoj kun la landaj asocioj. Aliaj programeroj de prelegantoj el Nederlando, Ĉeĥio kaj Germanio kompletigis la kongresprogramon. La kulmina punkto de la kulturprogramo estis koncerto de la grupo *La Kuracistoj*.

Ankaŭ ĉi-jare en Essen la jarĉefkunveno de la Germana Esperanto-Asocio havis centran lokon en la programo de la GEK. La 86a Germana Kongreso okazos kune kun la Eŭropa Esperanto-Kongreso Pentekoston 2009 en la Esperanto-urbo Herzberg.

Thomas Sandner

Amano: rimarkinda sukceso!

Antaŭ kelkaj jaroj la norvegaj esperantistoj diris (mi resumas laŭmemore): “UEA ne devus ricevi la premion Nobel, ĉar ĝi ne faras ion indan je tio. Ni norvegoj scias, kion oni devus fari, sed aliflanke ni ne povas, ĉar ni ne havas la necesajn rimedojn. Estus bone, se vi povus fari ion, ekzemple en la Meza Oriento.” Do, iusence, la morala merito de la 1a Mezorianta Esperanto-Kunveno en Amano (11–14 apr 2008) apartenas al la sugestintaj norvegaj esperantistoj, kiuj espereble taksos ĝin sufiĉa por aktiviĝi pri la premio Nobel.

Io simila, laŭ la esploroj de la israela esperantisto Doron Modan, estis farita en la 1920-ja jaroj en komplete malsama politika situacio de la regiono. Prelegon pri tio ricevis la dudekkvino da partoprenantoj.

Partoprenis multaj junaj israelaj esperantistoj (la plej granda grupo), arabaj esperantistoj el Jordanio (mi nombris kvar el ili), familio de esperantistoj el alia araba lando, Dubajo, tri el Turkujo kaj du el Eŭropo.

Fakte same en Amano estis okazinta kunveno por esperantistoj kunlige kun la UK en Telavivo (2000) kaj kelkaj el la tiamaj eklermintoj aperis ankaŭ nun.

La renkontiĝo okazis en amana hotelo *Palmyra*, kaj la sinteno inter la aliaj gastoj de la hotelo, kiel ĉiam okazas en la tria mondo, estis tre scivola pri ĉi tiu nova afero, pri kiu ili antaŭe ne aŭdis. Kelkaj neesperantistaj arabaj knabinoj el Libano, kiuj hazarde malkovris tie Esperanton kaj volis ricevi la unuajn lecionojn.

Okazis prelegoj kaj diskutoj. La prelegoj temis pri la situacio de Esperanto en la regiono, pri la antaŭaj provoj kunlabori, pri la araba lingvo, pri la turka folkloro. La diskutoj temis esence pri la maniero plej efike disvastigi Esperanton en arabaj landoj, pri la situacio en la golfaj landoj, kie aperas pli kaj pli da eksterlandaj esperantistoj, kiuj venas loĝi kaj labori tie, pri la aranĝado de la dua Mezorianta Kunveno venontan jaron.

La ĝenerala ideo estis, ke ni devas trovi manieron por aktive informi pri la jam ekzistantaj retaj kursoj en la araba pere de reklametoj en Google aŭ en ĵurnaloj, kaj ke ni aranĝu la venontjaran renkontiĝon pli malpli en la sama printempa tempo en alia lando. Povus temi venontan jaron pri Egiptujo aŭ Turkujo. Oni esploras pri la du eblecoj.

Entute la kunveno estis bona komenco per simila agado tra la venontaj jaroj.

La deveno el malsamaj landoj de tiu malfacila regiono ne kaŭzis problemojn dum la diskutoj. Esperantistoj ja kapablas kompreni alies vidpunktojn.

Oni ankaŭ abunde ekskursis tra Jordanio (de Petra al la Morta Maro). Kiel unua provo de la Komisiono pri agado en la landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko, la afero estis sukcesa, eĉ rimarkinde sukcesa.

Renato Corsetti

JER — bonhumora kaj familia

Aranĝojn kie infanoj kun siaj gepatroj, amantoj aŭ amikoj renkontiĝas dum amuza kaj tre familia semajnfino mi ne konis ĝis mi veturis al Szombathely. Tie okazis en marto ĉi-jara Junulara Esperanto Renkontiĝo (JER).

Por mi estis tre interesa sperti, kiel la lingvo Esperanto estas parolata ene de familioj — tio surprizis min kaj donis taŭgajn temojn por la babilado. Mi tre ĝojis vidi kaj renkontiĝi kun diversaj homoj, ankaŭ el aliaj landoj: Kroatio, Slovenio, Aŭstrio, Germanio.

La programo estis tre bone aranĝita. Dum la interkona vespero ni per nomludoj ekkonatiĝis kaj poste bone amuziĝis dum la Roki-dancado. La gaja kaj amikeca etoso tre plaĉis al mi, same kiel la amuza nokta urbopromenado.

Interesa programpunkto por frandemuloj estis la *kukumado*. Ni solene gustumis la kukojn, kiujn la partoprenantoj alportis. Estis vere bela momento kiam ni ĉiuj staris en rondo, tenis unu pecon el la sortimento en la mano kaj atendis la solenajn kukumad-malfermajn vortojn de Vera.

Alia programero estis la urboludo kaj numerbatalo. Unue ni per diversaj gruptaskoj malkovris la urbon kaj poste batalis unu kontraŭ la alian en la parko — sed sen armoj, pafoj kaj sango. Ambaŭ ludoj kontribuis la belega posttagmezo en la parko. Imagu la bildon: Grupo da homoj en vico, kiu saltante sur unu piedo transiras ponton.


Por la homoj, kiuj interesiĝis pri la baldaŭa IJK fine de julio, certe estis vidindaj la IJK-ejoj. Kaj mi rekomendas al vi veni al IJK-2008 en Szombathely!!!

Julia Hell

“La Ondo” partoprenos

26–30 maj. Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj en Vilno (Litovio).

26 jun – 2 jul. FREŜO en Olsztyn (Pollando).



Konversacia rondo en Vigy

Lerni kaj praktiki en gaja etoso

Dum la unua maja semajnfino la loka asocio Esperanto-Thionville organizis por la Orienta Franca Esperanto-Federacio la 63an regionan staĝon de Esperanto en la vilaĝo Vigy (Loreno, Francio).

55 partoprenantoj venis el Germanio, Luksemburgio kaj Francio. Eĉ du gestudentoj el Belorusio kaj Uzbekio komencis lerni Esperanton.

Ni starigis kursojn por infanoj (Ginette Martin), por komencantoj (Marcel Redon), kaj por progresantoj (André Grossmann). La konversacian kurson gvidis Michel Dechy, kiu uzis la albumon *Tinĉfo en Tibeto* por paroligi la lernantojn. Catherine Kremer prelegis pri historio de nia provinco Loreno. Dum la paŭzoj la partoprenantoj vizitis la libroservojn de la federacio kaj de *La Gazeto*.

Vendrede vespere Bernard Vivier kaj Marie José Behm el nia klubo *Esperanto Thionville* prezentis videofilmon kiun ili kreis en Esperanto pri la 92a UK en Jokohamo. Sabate vespere post la kurso deklamadis Robert Kueny el Mulhouse.

Sabate vespere la poliglota kantisto Jomo el Tuluzo kantis vigle en diversaj lingvoj. Li entuziasmigis kaj dancigis ĉiujn partoprenantojn. Kelkaj neesperantistoj el la regiono partoprenis la koncerton kaj malkovris tiumanieron Esperanton.

Sub la printempa suno la staĝantoj vizitis sabate la galeriojn de la muzeo de la lorenaj ferminejoj en Neufchef, kaj dimanĉe turista trajno promenigis ilin en la verda valo Canner de Vigy al Hombourg-Budange.

La etoso estis tre bona, ĉiuj estis gajaj kaj lernis multe!

Bruno Henry

Ĝui la belecon de la lingvoj

(Landa Agado) Ok Esperanto-grupoj de Tokio kunorganizis 19 apr unu-tagan publikan kunvenon en la Japana Esperanto-Instituto kun ĉeesto de ĉ. 60 homoj. En la unua parto prelegis prof. Kimura Goro Cristoph pri Internacia Jaro de Lingvoj. Li parolis, ke la mondo aspektas alie laŭ lingvoj, per kiuj ni vidas ĝin. Gravaj diversaj lingvoj, per kiuj ni komprenas la mondon.

En la dua parto 11 personoj legis parteton de *La Eta Princo* en 11 lingvoj inkluzive de Esperanto. Iuj unufoje aŭskultis la soraban kaj tok-pisin. Oni ĝuis la diferencojn kaj belecojn de la lingvoj. Poste prezentiĝis ok elementaj kursoj, kiuj komenciĝos baldaŭ diversloke en Tokio. Kunlaboris Japana Esperanto-Junularo, pro kio partoprenis multaj junuloj.

Syózi Keiko

Denove en Ranzan

(Landa Agado) Komence de majo, dum feriaj tagoj, japanaj esperantistoj organizis plurajn renkontiĝojn: *Friska Lernejo* kune kun Namkang-a Lernejo en Koreio, *Verda Lernejo* en Nagano, *Kantu en Esperanto* en Yamanasi, Esperanto-Seminario en Saitama.

Ĉi-lastaj, la 41a Esperanto-Seminario, organizita de JEI okazis 3–5 maj en Ranzan, gubernio Saitama, en la Ŝtata Eduk-Centro por Virinoj, kiu pasintjare akceptis ILEI-konferencon post la Jokohama UK.

Ses gvidantoj, inkluzive de polo kaj kanadano, proponis al la 33 kursanoj 12 horojn da lernado de ABC ĝis tradukarto. Krome okazis fakkunsidoj (aŭ ekzamenado) kaj la komuna Gaja Vespero kun vortludo, irlandaj danco, magio, muzikoj kaj kantoj.

Tahira Masako

Jubilea jarkunveno de DEA

18–20 apr Dana Esperanto-Asocio festis sian centjaran jubileon per varia kaj riĉa programo: festparolado de Renato Corsetti, muzika interludo, prelegoj de Detlev Blanke, Wera Blanke, Anna Löwenstein kaj Renato Corsetti, koncerto de JoMo kaj inaŭguro de ampleksa ekspozicio pri la unua jarcento de la dana kaj cetera movado.

Ileana Schröder

Jalto — aroma kaj internacia

La 20a festivalo *Aroma Jalto* ĉi-maje allogis al Jalto (Ukrainio) 112 esperantistojn el ses landoj. 79 el ili estis eksterlandanoj, precipe el Pollando.

Okazis Esperanto-kursoj, Universitato, ekskursoj, piedmarŝoj, koncertoj, ludoj ktp. La malkrokodilan konkurson gajnis Kerstin Rohdin el Stokholm kaj Tatjana Auderskaja el Odeso. La princo estas elektita Ivan Neĉes el Kijivo, la princino — Tatjana Auderskaja.

Volodimir Hordijenko

Istruista trejnado

Esperanta Kunfratiĝo de Okcidenta Regiono en Rio-de-Janeiro (Brazilo) organizis la 11an Trejnadon por Esperanto-instruistoj. Ĝi okazis 27 apr en la kvartalo Campo Grande. Partoprenis 26 geesperantistoj (vd. la suban foton), kiuj havis lecionojn pri jenaj temoj:

1. Psikologio de homaj rilatoj kaj timideco.
2. Instrua pedagogio kaj didaktiko de plataĵo.
3. Kiel instrui Esperanton por infanoj?
4. Kiel instrui per didaktikaj ludiloj (porinfana)?
5. Kiel prepari lecionojn?

Paulo Carvalho

Kune festi en Berlino

Post la UK en Rotterdam Esperanto-Ligo Berlin invitas al jam tradicia aranĝo.

Ĉi-jare la ĵurnalisto kaj filmisto Roman Dobrzyński en la ekspozicia salono de la Pola Instituto en Berlino prezentos sian libron *La Zamenhofstrato*. Michael Scherm, instruisto el Neu-Ulm, prezentos sian tradukon de la verko en la germanan, unu el jam 20 tradukoj de la libro.

“La lingvokreinto Ludoviko Lazaro Zamenhof kaj lia Esperanto en hodiaŭa mondo” estas la temo de nia festo. Per ĝi ni komencos en Berlino la atentigon pri la sekvontjara UK en Bjalistoko dediĉota al la 150a naskiĝdatreveno de Zamenhof.

Antaŭ 100 jaroj, 23–25 aŭg 1908, Zamenhof vizitis Berlinon post la 4a Universala Kongreso de Esperanto en Dresdeno. Li parolis antaŭ granda publiko en la tutplena Civitana Salono de la Berlina Urbodomo kaj estis akceptita de la prusa ministro pri religiaj, instruaj kaj medicinaj aferoj, d-ro Holle.

2 aŭg 2008 la partoprenantoj renkontiĝos je la 14a horo en Esperanto-Kulturdomo en Einbecker Straße 36 proksime de la stacidomo Berlin Lichtenberg. Estos rigardeblaj la valora kaj fama Espoteko (kolekto de libroj, gazetoj kaj dokumentoj), kunvenejo de “Ĵaŭda Rondo” kaj la domo.

Poste ni ĝuos koncerton en proksima parko, kie ni en tiu tago lanĉos la proponon doni al ĝi en 2009 la nomon “Zamenhofpark”. Alexander Danko, konata muzikisto kaj esperantisto, akordionos kaj ankaŭ aliaj muzikantoj kontribuos per sia arto. Dum unuhora veturado per historia tramo ni informos pri Esperanto en Berlino en pasinteco kaj nuntempo, aparte pri eventoj de la postkongreso en 1908 kaj la restado de Zamenhof en Berlino. Nia tramo venos al la stacidomo Hackescher Markt, kaj ni iros de tie al la berlina sidejo de la Pola Instituto, kie okazos la prezento de *La Zamenhofstrato*.

La Pola Instituto en Berlino diskonigos la aranĝon en sia programo. Post la fino interesatoj daŭrigos la kunestadon en la restoracio *Mansy*.

Bonvolu anonci sin ĝis 15 jul 2008 ĉe Esperanto-Ligo Berlin:

✉ Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, Germanio

☎ 030-55 15 70 16

Fax: 55 15 70 17

📧 peter.kuehnel@esperanto.de.

Fritz Wollenberg





Bonaero: Esperanto estis bone videbla en la librofoiro (*Sendis Roberto Sartor*)

En Bonaera libro-foiro

En Bonaero, la ĉefurbo de Argentino, inter 24 apr kaj 12 maj okazis la 34a Internacia libro-foiro. Vizitata ĉiujare de pli ol unu miliono da personoj, ĝi estas la plej taŭga loko por disvastigi la internacian lingvon.

Esperantistaj volontuloj disdonis informilojn pri Esperanto. En la evento “Instruado de lingvoj” apud aliaj lingvo-instruistoj ĉeestis Argentina Lernejo de Esperanto de AEL (Argentina Esperanto-Ligo) kaj aktivuloj de la asocio. Aliandaj docentoj prelegis en la angla, germana, franca kaj portugala, kun interpretado al la hispana. Ni do havas taŭgan ateston por argumenti favore al la internacia neŭtrala komuna lingvo.

10 maj en la sidejo de AEL (str. Paragvajo), kiu estas sidejo ankaŭ de la Esperanto-lernejo de AEL kaj de la Bonaera Esperanto-Societo okazis malferma Esperanto-leciono de Aneta Ubik kaj Silvia Rottenberg, kiun danke al bona informado en la foiro kaj en la gazetaro vizitis dudek personoj.

La organizantoj de la foiro invitis esperantistojn partopreni venontjare kun prelego kaj diskutforumo. AEL akceptis la inviton kiel defion por prepari la landan samideanaron al la Universala Kongreso, antaŭvidata en Bonaero je la jaro 2012.

Roberto Sartor

Esperanto diligentigas lernantojn

UFEPLAT estas federacio de privataj lernejoj en Togolando. Ankaŭ Instituto Zamenhof aliĝis al ĝi. Por prepari la lernantojn al la ŝtata ekzameno, UFE-FLAT organizis provekzamenon tra la lando. Estis pluraj grupoj, kaj Instituto Zamenhof estis en la grupo de ok lernejoj en Lomeo, la ĉefurbo de Togolando.

La lernejoj LE PARI, ADODO,

Institution Montesquieu, Institut Zamenhof, Belle Lagune, Middas, Mon Devoir kaj Saint Ciriaque prezentis respektive 46, 66, 34, 28, 13, 26, 32 kaj 35 kandidatojn. La rezultoj montris 23 sukcesintojn el 278 (du gelernantoj de LE PARI ne povis ekzameniĝi).

Inter la 23 sukcesintoj, el Instituto Zamenhof estis 11, el ADODO 4, el Mon Devoir kaj Saint Ciriaque po 2, el Middas 3, kaj el Institution Montesquieu 1. Neniu sukcesis en la aliaj lernejoj. La unuan rangon okupis la sola sukcesinto de Institution Montesquieu, sed la dua, tria kaj kvara rangoj estas de Instituto Zamenhof.

Certe oni nun pensas, ke Esperanto diligentigas gelernantojn, ĉar iu klarigis la sukceson de IZO-gelernantoj, dirante: “Ĉu ne en tiu lernejo oni instruas ankaŭ Esperanton? La gelernantoj multon lernas, kaj tial ilia cerbo havas multe pli da forto por kapti multon. Jen do la gelernantoj estas inteligentaj kaj diligentaj”.

La ŝtata ekzameno okazos en junio.

Gbeglo Koffi

Ekspozicio de ekslibrisoj

Ekslibriso estas signo de posedo de la libro, diranta, ke tiu ĉi libro apartenas al difinita librokolekto, al difinita posedanto, kies nomo videblas sur la ekslibriso. Ĝi estas malgranda paperfolio, enhavanta latinan surskribon “ex libris”, kio signifas “el librokolekto” aŭ “el la libroj” kaj la nomon de la posedanto de la librokolekto. Oni gluas ĝin al interna flanko de kovrilo en ĉiun libron el la kolekto.

Danke al laboro de Zofia Śmistek kaj Mirosław Wojalski lodzanoj povas rigardi en Lodza Kulturdomo “502” en la kvartalo Widzew unikan ekspozicion de Esperantaj ekslibrisoj. La festa malfermo, en kiu partoprenis la aŭtoro kaj gastoj el Lodzo kaj Varsovio okazis 22 apr 2008. Oni devas substreki, ke Esperantaj ekslibrisoj la unuan fojon estas prezentataj en konstanta galerio. La kolekton oni povas rigardi ĝis la fino de majo.

Robert Kamiński



Eventoj

ISTK: studi per Esperanto

Je la 662a fondodatreveno de la urbo Bydgoszcz (Pollando), 18–27 apr 2008 okazis la 33aj Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz, organizitaj de la Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo (ICKT) kun gastoj kaj studentoj el tri kontinentoj.

Kun la partoprenantoj renkontiĝis la urbestro Konstanty Dombrowicz, kiu prezentis atingojn de la urbo kaj akceptis la honoran protekton por la 18a Internacia Esperanto-Kongreso, kiu okazos en Bydgoszcz antaŭ la 94a UK en Bjalistoko. En la urbodomo prezentis afrikan kulturon *Afrika Umba* — ensemblo de studentoj el Kamerunio, Senegalio kaj Tanzanio.

La partoprenantoj ekskursis en Bydgoszcz, partoprenis en festo de la urba Ekonomia Altlernejo; eksterlandaj studentoj estis invitataj al la universitato de Kazimiro la Granda, kie d-rino Katarzyna Lubiewska parolis pri la pola kulturo.

En la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz (ISTK) dum la semajno oni realigis plurajn kursojn en Esperanto pri turismo kaj kulturo, kiujn gvidis fakuloj el Pollando, Bulgario kaj Svedio. Prof. Aleksandra Kowalczyk gvidis bakalaŭranmagistran seminarion de AIS.

Okaze de la Tagoj ĉe la Studumo oni malfermis baron-krespejon *Bongustejo* kaj internet-kafejon *Esperanto* (esperanto_kafejo@yahoo.com), kiun gvidas Bold Czinzorig el Mongolio.



Dum la Tagoj kaj la 36a sesio de AKB-AIS-Klerigejo en Bydgoszcz studentoj el Afriko, Azio kaj Eŭropo defendis siajn disertaciojn en Esperanto.

Oni povas aliĝi al la studoj en ISTK por 2008/2009 por ricevi kvalifikojn: vojaĝgvidanto, ĉiĉerono, instruisto de Esperanto. Pliajn informojn vidu ĉe www.esperanto-turismo.org

ISTK

IOM-e progresas Esperanto

En la Manksa Insulo (angle: Isle of Man = IOM) cent infanoj de la tria ĝis la sesa lernojaroj en la elementa lernejo Marown ekde la pasint-jara septembro lernas Esperanton kadre de pilota projekto *Salttabulo al Lingvoj* (Springboard to Languages). Ĝi estas unu el la kvar britaj lernejoj, kiuj partoprenas en la projekto. Esperanton en ĝi instruas Pat Burgess.

Loka amaskomunikilo informas, ke kunordigantoj de la projekto, David Kelso kaj Angela Tellier, estis “impresitaj” dum la vizito al la lernejo pri la kapabloj de la infanoj libere uzi la lingvon konversacie post ok monatoj de lernado dum kelkaj horoj semajne. Krom la praktikaj celoj lerni la lingvon mem, la kurso ankaŭ instigas respekti aliajn lingvojn, kulturojn kaj landojn.

Andrej Peĉonkin

Sciencnivele en Ukrainio

10–12 apr en la Volinia universitato Lesja Ukrainka (Luĉjk, Ukrainio) okazis konferenco “Interagado de etnaj kaj planitaj lingvoj en la kunteksto de la eŭropa integriĝo”. Ĝin partoprenis 74 sciencistoj el Ukrainio, Pollando, Britio, Italio, Svislando, Belgio.

Krom la plenkunsidoj, en kiuj ankaŭ esperantologiaj temoj estis prezentitaj, laboris sep sekcioj, inter kiuj ankaŭ la sekcio “Funkciado de la internacia lingvo Esperanto kaj ĝia lernado” — unuafoje en Ukrainio en la universitata scienca konferenco internacinivela funkciis sekcio dediĉita al Esperanto, kies laborlingvo estis Esperanto.

Post omaĝo al la forpasinta Claude Piron estis prezentita prelego de Renato Corsetti “Nova modelo por instrui fremdajn lingvojn al junaj eŭropaj lernantoj”. Raportis N. Daniljuk pri la vorto *Esperanto* kaj aliaj derivitaj vortoj en la ukrainaj vortaroj, S. Pogorelaja kaj A. Ŝlaĥova pri metodiko de Esperanto-instruado, N. Voloŝin pri novaj eldonaĵoj de ukraina literaturo en Esperanto.

La partoprenantoj akceptis la rezolucion, en kiu oni substrekiis gravecon kaj altan nivelon de la prelegoj pri Esperanto, neceson de specialaj sciencaj esploroj pri la E-movado, lingvaj kvalitoj de Esperanto, ĝiaj eblecoj kiel laborlingvo dum internaciaj konferencoj, proponis uzi la resumojn de la artikoloj en Esperanto. Ĉiuj ĝustatempe senditaj artikoloj aperis en speciala numero de la scienca revuo de la universitato.

Nina Daniljuk



Maksimulaj lernejoj lernas Esperanton (sendis A. Tellier)

Simpozio okaze de la dekjarigo de la Interlingvistikaj Studoj en UAM

La Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań, la dua plej granda universitato en Pollando, ofertas trijaran eksteran postdiploman studadon pri interlingvistiko, kiu funkcias jam dek jarojn.

La **internacia kursaro** okazas en la Lingvistika Instituto, sub la gvido de d-rino Ilona Koutny, membro de la Akademio de Esperanto. Inter la prelegantoj estas elstaraj esperantologoj, kiel profesoroj Humphrey Tonkin, John Wells, Aleksander Melnikov kaj Michel Duc Goninaz; doktoroj Vera Barandovská-Frank, Detlev Blanke, Katalin Kováts, Zbigniew Galor kaj Blazio Vaha; la poetino Lidia Ligęza, ekspertoj de sia tereno kiel Maria Majerczak, Tomasz Chmielik, István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Michael Farris kaj Bradjo Moro.

La **Interlingvistikaj Studoj** donas superrigardon pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, fokusiĝas al internacia kaj interkultura komunikado, traktas planlingvojn kaj detale okupiĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de esperanto. En la tria jaro eblas specialiĝi pri komunikado, lingvistiko, literaturo, tradukado, planlingvistiko aŭ pri lingvopedagogio. Pro la metodika formado la Studoj ricevas specialan rolon en la instruista trejnado. Ekde la studjaro 2007/2008 realiĝas kunlaboro kun ILEI.

Unusemajnaj intensaj sesioj (surlokaj kursoj de po kvar studobjektoj kaj ekzamenoj) okazas unuafoje dum la semestro (fine de septembro kaj komence de februaro), intertempe la gestudentoj laboras pri siaj taskoj hejme kaj konsultiĝas rete kun la prelegantoj. La gestudentoj pretigos diplomlaboraĵon

kaj post la fina ekzameno ricevos atestilon pri la Interlingvistikaj Studoj.

Partoprenantoj povas aliĝi el la tuta mondo por la studjaro 2008/2009 ĝis la **15a de aŭgusto 2008**. Pli frua anonco estas bonvena. La unua sesio okazos inter 13–17 sep 2008.

Postuloj: diplomo pri superagradaj studoj kaj bona scio de esperanto. Partoprenantoj devas plenumi orientigan teston komence de la unua sesio. Kelkaj stipendioj estas antaŭvidataj dank’ al ESF (Esperanto Studies Foundation).

Kotizo por unu semestro: 1850 PLN (ĉ. 500 EUR), reduktita 700 PLN (ĉ. 200 EUR) por B-landoj.

Ĉi-foje okazos ankaŭ **resta interlingvistika simpozio** kun riĉa programo okaze de la dekjarigo de la Studoj post la unua sesio (18–19 sep), al kiu ni invitas ĉiujn niajn gestudentojn kaj prelegantojn kaj interesiĝantojn. La septembra sesio estas ligita kun la semajnfina kultura renkontiĝo ARKONES (19–21 sep), same en Poznań, kiu post la intensa tutsemajna serioza laboro ebligas malstreĉiĝon.

Se la studentoj bezonas lingvan perfektigon, eblas aranĝi **superanivelan intencan lingvokurson** (unusemajnan) antaŭ la septembra sesio kontraŭ kroma kotizo.

✉ d-rino Ilona Koutny, Lingvistika Instituto de Universitato Adam Mickiewicz al. Niepodleglosci 4, PL-61-874 Poznań, Pollando

☎ +48 61-829-36-75

✉ ikoutny@amu.edu.pl, interling@amu.edu.pl

<http://www.staff.amu.edu.pl/~interling/index.html>

Ilona Koutny

Produktita la unua jubilea medalo

Estas jam produktita la unua el la tri medaloj aprobitaj de la Civita Parlamento, honore al la zamenhofa kaj literatura esperanto-jubileo 2009. Temas pri arĝenta medalo kun la vizaĝo de Zamenhof profile, kaj la blazono de la Esperanta Civito reverse, laŭ dimensio egala al la svisa kvinfranka monero. Ĝi rememorigas la arĝentajn spesmonerojn de 1912 (kie la blazono praktike identas al tiu de la Esperanta Civito).

La medalo estos prezentita unuafoje al la publiko en Vilno, okaze de la Tutmonda Ĵurnalista Kongreso. La medalo, realigita de juvelisto kaj artforĝisto kiu havas la esperantan civitanecon, estas aĉetebla kontraŭ kvindek eŭroj ĉe Fonduso Pro Esperanto (FPE). Mendebila rete ĉe: pakto@esperantio.net.

Ekde 15 dec 2009 ĝi estos rekonvertibla al eŭroj, kaj cirkulados kiel 50-eŭra monero en la Esperanta Civito: per ĝi eblos pagi abonojn ĉe LF-koop, tranoktadojn ĉe KCE ktp. Per tio FPE fariĝos kvazaŭ emisia banko. Do estos kaj numismata kaj kuranta valoro.

HeKo



Invito por vojaĝo lanĉita

19 apr 2008 en la kulturdomo *Kas-teleto Kokel* de la kvartalo Rosendeël en Dunkirko (Dunkerque) antaŭ multnombra publiko estis lanĉita la albumo *Invito por vojaĝo* de Jacques Yvart.

Post bonvenigaj paroladoj de kulturfunkciuloj kaj esperantistoj finfine venis la longe atendita momento: Jacques Yvart prezentis siajn du kunmuzikistojn (violonistino Sarah kaj basgitaristo Alex) kaj prenis sian gitaron... Tre facile Jacques Yvart konkeris la publikon ekde la unua kanzono *En la Valo de l'Rozoj*, kiun sekvis *La ĉevaleto* el la repertuaro de Georges Brassens kaj *Oe oe en la ŝipo*.

Post la lasta kanzono Yvart dankis la ĉeestantaron kaj invitis la deputitonurbestron, Michel Delbarre. La eksministro laŭdis sian "amikon Jacques", nominte lin "heroldo de pacmesaĝoj",



Sarah, Jacques kaj Alex invitas al vojaĝo.

kaj diris, ke ofte li renkontis alilandajn deputitojn kaj rimarkis, ke estus pli facile komuniki per Esperanto, sed bedaŭrinde multaj tradukistoj kaj interpretistoj do estus senlaboraj... La kantisto transdonis al li sian novan KD-on, kiu estas lia dua en Esperanto... sed jam la 26a disko en lia longa kariero!

Post la eta koncerto kaj "honorvino", Jacques Yvart tre volonte kaj amike subskribis diskojn... kaj Flo estis tre okupata: li revenis hejmen kun nur malmultaj el la cent kunprenitaj diskoj.

Flo kaj Mike

Kristnasko: bilde kaj poezie

Triesta Esperanto-Asocio starigas internacian konkurson *Kristnasko: bilde kaj poezie*.

Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun la aĝo de 6 ĝis 14 jaroj, kiuj sendu ĝis 10 nov 2008 siajn verkojn al Esperanto Trieste (C.P. 601 Trieste Centro IT-34101 Trieste, Italia).

Oni rajtas kontribui per unu aŭ pli da verkoj pri la supre indikita temo, en la kategorioj:

- 1) desegnaĵo, maksimume unu A4-formata folio;
- 2) poeziaĵo.

La desegnaĵo havu komenton aŭ frazon en Esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro. La poeziaĵo estu en Esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro.

Por ĉiu verko estu ankaŭ indikitaj: persona kaj familia nomoj, poŝta adreso, aĝo, lernejo kaj klaso.

Se eblas, bonvolu aldoni malgrandan foton de la aŭtor(in)o.

Ĉiuj konkursaĵoj prezentiĝos al publiko dum la kristnaska periodo 2008. La vizitontoj kaj elektota ĵurio donos poentojn al la plej bela verko el la du kategorioj. Oni anoncos la premiitojn, laŭ kategorio kaj aĝo (6–8 jaroj, 9–11 jaroj, 12–14 jaroj) enkadre de publika ceremonio en Triesto.

Por kromaj informoj: noredv@tele2.it aŭ testudo.ts@gmail.com

TEA

Unufraze

★ 9 maj 2008 (la Tago de Eŭropo) en la populara franca ĵurnalo *Le Monde* aperis granda informo pri Eo k lingvopolitiko en EU, pagita de Etsuo Miyoshi, prezidento de japana kompanio *Swany*. (Henri Masson)

★ Aperis en la maja-junia n-ro de la germana revuo *Postfrisch* dupaĝa artikolo pri E-temaj poŝtmarkoj k Eo. (Rudolf Fischer)

★ Danke al Kollár Lejla, kunlaboranto de la E-Asocio ĉe *Eventoj*, nova hungara TV-kanalo 5 elsendis 27 apr sesminutan, leĝerstilan programon pri Eo. (Szilvási László)

★ Tutlanda norvega TV2 en sia programo *Hjelpekorpsset* (La helpantaro) helpe al personoj, kiuj petis konsilojn kiel verki krimrakonton, prezentis murdon de du instruistoj de fremdaj lingvoj fare de e-ista instruisto, kiu enviis la sukceson de aliaj lingvoj. (*Norvega Esperantisto*)

★ En solena akcepto la urbestro de Pirna (Germanio), proklamis e-iston Norbert Karbe laŭreato pro honorofica kultura laboro per Eo. (*Esperanto aktuell*)

★ D-ro Wim Jansen, docento pri interlingvistiko ĉe la Universitato de Amsterdamo, gvidos la Internacian Kongresan Universitaton dum la Roterdama UK, en kiu prelegos 11 personoj. (GK UEA)

★ Pere de Eo, Per Johan Krogstie (Norvegio) havigis tradukojn de informteksto pri la hejmo de la norvega verkistino Sigrid Undset (1882–1949) en la orientnorvega urbo Lillehammer, al 21 lingvoj. (Douglas Draper)

★ 4–6 apr en Písek (Ĉeĥio) dum la E-renkontiĝo *Sabla Printempo*, unuafoje subtenita de la urbestro, E@I kunorganizis seminarion pri Vikipedio, en kiu okazis i.a. verkado de artikoloj pri turismaj lokoj en la regiono de Písek. (*Novafletero de E@I*)

★ 12 maj 2008 Maritza Gutiérrez el la Amerika komisiono de UEA prelegis pri "Esperanto: alternativo por la kultura k komunika diverseco" en la jura Fakultato de la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko antaŭ 70 universitatanoj. (Luis Córdova Arellano)

★ Konata franca aktivulo Henri Masson ekis el SAT-Amikaro proteste kontraŭ la decembra kovrilpaĝo de *La SAGO* k radikaliĝa tendenco en SAT. (*Service de Presse*)

★ Post debato pri Eo en la nova lingvo-centro ĉe la kulturdomo *Maison de Begon* en Blois (Francio) oni decidis okazigi E-kurson. (*La SAGO*)

Nia opinioj pri la jubileanta UEA

Nia kvara *Ronda Tablo* estas dediĉita al UEA, kiu estis fondita antaŭ cent jaroj. Ni invitis aktivulojn de UEA kaj reprezentantojn de aliaj organizoj/tendencoj.

1. Kiun lokon, rolon kaj respondecon UEA, kiel la plej granda Esperanto-Asocio, havas en kaj ekster la Esperanto-komunumo?

2. Kiujn el siaj pozitivaj ecoj, agadoj kaj strukturoj UEA devos konservi?

3. Kion UEA forigu aŭ ŝanĝu por pli sukcesa agado? Kion novan ĝi enkonduku?

4. Laŭ kelkaj la nuna UEA estas tute alia asocio ol tiu, kiun oni fondis antaŭ cent jaroj. Ĉu vere?



Vinko Ošlak (Slovenio)
Prezidanto de la Esperanta PEN-Centro

1. UEA povus havi tre rimarkindan kaj rimarkeblan rolon en kaj ekster de Esperanto-komunumo. Bedaŭrinde ĝin blokas la dogmo de “neŭtraleco”, kiu ĝin historie rigardate puŝas de unu ekstremo al alia: de kompromisoj kun naziismo, faŝismo kaj komunismo. La neŭtraleco de Esperanto estas limigita en tiu senco, ke Esperanto apartenas aparte al neniu homa grupo; sed Esperanto ekzemple ne povas esti neŭtrala al la problemoj de lingva diskriminacio, ja tiukaze ĝi estus absoluta.

2. Konservu kaj pli emfazi solidarecan karakteron. Iamaniere Esperantujo povus fariĝi azilo por tiuj, kiuj perdis sian nacian patrujon. Tiamaniere ĝi ankaŭ ricevas politikan kaj moralan pezon, kian ĝi momente ne tro havas.

3. Forigendas polemiko kontraŭ ŝajne aŭ vere konkuraj organizaĵoj (kiel E-Civito — kompreneble mi la samon proponas ankaŭ al ili!) kaj la dogmo de neŭtraleco, respektive, redifino de vere nepra aspekto de neŭtraleco. Aliflanke UEA devus instali duonprofesian lingvan servon, precipe por doni al aŭtoroj kaj ĵurnalistoj eblecon reviziigi sian lingvaĵon kontraŭ tolerebla honorario. Nepras interrete organizita gimnazio en Esperanto, kiun junaj homoj povus fari paralele al siaj naciaj mezlernejoj. Tiel ni akirus propran inteligencion.

4. Nek la fondtempa nek nuna UEA estas kaj estu dogmo aŭ normo. Ĝi libere sin adaptu, ne morale, sed taktike kaj teknike al la postuloj de la tempo; sed ĝi restu sama super la tempoj rilate moralan bazon kaj lingvan justecon, kiu konsistigas la “internan ideon” de Esperanto.



Maria Sandelin (Svedio)
Blogposedanto

1. Platformo por ideoj kaj ilia aplikado. Kunordigado de agadoj.

2. La supre menciitajn.

3. Necesas pli da malfermece kaj efektiva demokratio, pli da moderneco, ekzemple, forme de aplikado de moderna kono pri komunikado, difino de

la koncepto “neŭtraleco”.

4. Estas tute normale kaj dezirinde ke asocio ne restu la sama dum cent jaroj. Ĝi evoluu en la takto kun la ĉirkaŭa mondo.



Vjaĉeslav Ivanov (Ruslando)
Redaktoro de “E-Novosti-Info”

1. Malgraŭ ke ekzistas alternativaj organizoj, UEA aspektas inter ili kiel Esperanto inter la ceteraj planlingvoj, almenaŭ en miaj okuloj. Malgraŭ foja kritikado, UEA restas stabila kaj daŭra, kio certe impresas pozitive.

UEA havas rilaton, rektan aŭ ne tre, preskaŭ al ĉio bona, kio okazas en Esperanto-medio. Ekzemple, en aprilo mi kunorganizis en Peterburgo la duan lingvan festivalon; la festivalo oficiale estis aranĝo de REU, la landa asocio de UEA. Kun mi en la organiza teamo de la festivalo estis kelkaj aktivuloj kiuj lernis Esperanton en 2003 en la kurso subvenciita de UEA. Kian rolon do UEA ludas? Ĝi estas ĉie ĉirkaŭ ni!

2. UEA daŭre faru la taskojn, kiujn ne povas bone plenumi entuziasmoj en siaj E-rondetoj surloke. Inter tiaj agadoj: subtenado de bona kadro por Esperanto-medio (libroservo, konstanta oficejo, revuoj ktp.), regula traktado kun internaciaj organizoj (kiel UN), dokumentado de la okazaĵoj, strebado ekuzigi Esperanton en “neeniritaj” teritorioj.

3. Mi ŝatus, ke UEA havu reklame klarigan folion, kiu, kiel siatempe “ŝlosilo” de Esperanto, estu ŝlosilo de UEA. Certe la nunaj asocia paĝaro kaj la jarlibro ne estas sufiĉe superrigardeblaj por plenumi tian taskon. Estu ia tre skiza kaj atentokapta skema enkonduko en la servaron de la asocio: kiujn servojn membro povas havi, kion membro devas fari por uzi la servojn. Mi ŝatus ankaŭ, ke UEA havu konstantajn oficejojn krom la centra ankaŭ en aliaj partoj de la mondo.

4. Mi certe ne havas opinion pri tio, ĉar mi naskiĝis en 1978 kaj mi ne spertis, kia estis UEA eĉ en la 1990-aj jaroj, ne parolante pri tio, kio estis cent jarojn antaŭe. Certe, eĉ supraĵe esplorante tiun tempon, eblas facile rimarki, ke la ideoj kaj la valoroj tiam estis aliaj; supozeble ankaŭ UEA ŝanĝiĝas kun la tuta mondo.



Jakvo Schram (Belgio)
prezidanto de la Plenumkomitato de SAT

1. La rolo, kiun UEA havas, estas disvastigi Esperanton, respektante ĉies politikan kaj filozofian opinion. Kiam UEA plenumas tiun rolon, ĝi jam plenumas gigantan laboron. UEA devas preni respondecon pri ĉiuj satelitaj asocioj kaj lokaj grupoj, kiuj laboras sub tegmento de UEA. Ke tiuj grupoj restu politik-neŭtralaj kaj sendependaj de naciaj kaj naciismaj influoj.

2. Ke UEA bonbolu disvastigi Esperanton.

3. Pardonu la ioman brutalecon en la respondo. Se mi sciis la magian trukon por havi sukceson, mi unue aplikadus ĝin ene de SAT, al kiu mi kore estas ligita. Eble UEA faru pli da propagando por asocioj kies laborlingvo estas Esperanto. Ĝis nun UEA propagandas kaj disvastigas la lingvon, sed forgesas aplaŭdi kiam tuta asocio uzas la lingvon, strange.

4. Ĉu UEA estas alia asocio, aŭ ĉu UEA nur evoluis dum la tempo kaj historio de la movado... Mi esperas ke UEA evoluis kaj ŝanĝiĝis; alie ĝi ne valoras ĝian ekziston.



Hèctor Alòs i Font (Katalunio)
Estrarano de Kataluna Esperanto-Asocio

1. UEA estas ja larĝe la plej granda internacia Esperanto-asocio, kaj ĝia relativa pezo pligrandiĝas pro malkresko de la eventualaj konkurantoj, kvankam malpli kaj malpli da homoj emas asociiĝi. Ĝian centran rolon ĝi sukcesos teni eĉ pli firme, se ĝi unuflanke provizas kvalitajn servojn al la Esperanto-komunumo, kaj aliflanke sukcese okupiĝadas pri la prestiĝigo de Esperanto en internaciaj rondoj, same registaraj kiel ne-registaraj kaj akademijaj.

2. UEA havas bonan servostrukturon, kiun indas konservi, kvankam ĝi devas pli malfermiĝi por akiri novan, junan publikon, ekz. en la Universalaj Kongresoj. La subtenado de la revuo LPLP, de la universitataj esplorkomitatoj pri planlingvistiko kaj de la diversaj sciencaj simpozioj pri lingvaj rajtoj estas plene celtrafa veto, necesa por kreskigi la tre malaltan prestiĝon de esperanto en la akademia kaj registar-organiza komunumoj, tamen por tio necesas esti pli strikta en la nivelo de la prelegantoj, kiu foje tro lamas.

3. UEA, kiel tegmenta asocio de la esperanto-komunumo, devas diversigi sian desuprisman veton, ĉar Esperanto postulas profundan socian ŝanĝon neblan en demokratiaj landoj sen desuba prem-agado. Tiucele, tre indas investi fortojn en la formiĝanta strukturo de la Sociaj Forumoj: se Esperanto akiras rolon en ĝi, ĝi eble akiros ĝin en oficialaj kadroj. Aparte la kunlaborado kun movadoj por la defendo de minoritataj lingvoj ŝajnas grava kaj pli promesplena ol la flirtado kun organizoj por la defendo de malfortiĝantaj eksimperijaj lingvoj, kiuj ne serĉas lingvoegalecon kaj kontraŭas lingvajn rajtojn en siaj teritorioj. Same estas danĝere kaj malrekomendinde tro signife ligiĝi al ŝtatoj, kiuj propagandcele iom subtenas Esperanton, sed samtempe sufokadas siajn lingvajn malplimultojn. La kunlaborado kun internaciaj organizoj kiel Linguapax kaj la altigo de la prestiĝo de Esperanto en la akademia mondo, per subteno de fakaj eldonaĵoj en naciaj lingvoj, estas ankaŭ nemalhavebla longatempa politiko.

4. Asocioj devas ŝanĝiĝi, same kiel ŝanĝiĝas la ĉirkaŭa socio: tio okazas kaj al UEA kaj al ĉiu iom vigla cent-jara asocio. Tamen indas repreni kelkajn praktikojn de la pionira Esperanto-movado: ekzemple, oni tiam senhezite akceptis, ke finnoj, hungaroj, ĉeĥoj, poloj, skotoj aŭ katalunoj salutu en la Universalaj Kongresoj, kvankam ne temis pri sendependaj ŝtatoj, dum nuntempe, post la Lapenna periodo, UEA fariĝis strikte ŝtatema kaj malpermesas tian agnoskon eĉ en kongres-sildoj, pro kio perdas simpatiojn inter valoraj aktivuloj.



Renato Corsetti (Italio)
prezidanto de Itala Esperanto-Federacio
eksprezidanto de UEA

1. Daŭrigi la agadon de Zamenhof pri disvastigado de Esperanto al la tuta mondo, reprezenti la komunumon de la parolantoj de Esperanto en monda kadro kaj antaŭ neesperantistaj internaciaj organizaĵoj.

2. UEA devas konservi sian universalecon kaj kunlabori kun esperantistoj el ĉiuj landoj, politikaj sistemoj, religioj, ktp. UEA devas konservi sian demokratecon, kun decidoj faritaj per interkonsultiĝoj kaj voĉdonado de ĉiuj esperantistoj. UEA devas konservi sian malfermecon al la mondo kaj adaptiĝi al ĝi.

3. Laŭ mi ĝi devus transiri al situacio, en kiu 50 elcentoj de la enveninta mono estu rekte dediĉata al aktiva informado pri Esperanto. Ĝi povus ankaŭ malfermiĝi al pli facila reorganizado de la propraj strukturoj, sed tio estas detalo, laŭ mi.

4. Jes kaj ne. Vere la nuna UEA estas kombino de individuaj membroj kaj de landaj asocioj, sed tio estas io pozitiva, ĉar, laŭ la instruoj de nia historio, tiuj du fortoj daŭre kunekzistis. Fortranĉo de unu el ili estus nur perdo por UEA.



Giorgio Silfer (Eŭropo)
membro de Scienca Instituto
Dietterle (pri historiografijaj,
demografiaj kaj statistikaj esploroj
pri Esperantio)

Mi respondas al viaj demandoj komencante per la lasta, ĉar ĝi fakte estas premiso al la ceteraj tri.

4. UEA naskiĝis kiel praraŭmisma esence perlingva organizo, kun nur individuaj membroj. Tia ĝi restis ĝis la Interkonsento de Kolonjo (1933). La nuna UEA evoluis el la Interkonsento de Kolonjo, pli precize el la reĵetokrizo post tiu granda grefto, kio kondukis al la fondo de Internacia Esperanto-Ligo (1936). Do la nuna UEA estas IEL sub alies nomo, esence porlingva organizo sen propra filozofio.

1. Se respondi slogane: la nuna UEA reprezentas esperanton, sed ne Esperanton. Ĝi analogias al British Council por la angla aŭ Alliance Francaise por la franca, kvankam sen la lingvosciencia kompetento kiu karakterizas tiujn porlingvajn organizojn. Ekzemple, ĉe la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo esperanton reprezentas KCE, ne UEA (aŭ unu el la fakaj asocioj); kaj ĉe eksteruloj la esperanto-literaturon reprezentas la Esperanta PEN-Centro, kaj ne UEA (aŭ unu el la fakaj asocioj).

2. Por respondi al la demando, necesas reformuli ĝin tiel: se vi volus mortigi UEAn, kiun servon necesus unuavice mortigi? kaj duavice? kaj triavice? La plej grava problemo estas la demando pri la neŭtraleco, kiu estas respondebla alimaniere ol nun, kaj ne nepre per forigo de la neŭtraleco. Ekzemple ĉe la Esperanta Civito la demando estas solvita alimaniere, kaj efike, kvankam ne lezante la neŭtralecon de la paktintaj establoj, se ili estas politike neŭtralaj.

3. Por respondi al la demando, necesas reformuli ĝin tiel: se vi volus prosperigi UEAn, al kiu organiza modelo necesus inspiriĝi, unuavice? kaj duavice? kaj triavice?





Gbeglo Koffi (Togolando)
Administranto de Afrika Centro Esperantista

1. Estas tri lokoj, kie oni klopodu trovi, ĉu UEA agadas tie:

En UEA-medio la membroj faras nenion, la komitato estas pasiva, kaj la estraro povas nenion decidi, ĉar ĉiam la ĝenerala direktoro de UEA altrudas sian volon, kaj la kompatinda estraro

silentas. Nur la estraro 1998–2001, prezidita de Kep Enderby, povis memstare labori. La ĝenerala direktoro ne povis elteni kaj demisiis, antaŭ ol reveni poste. La sekva prezidanto Renato Corsetti ne povis elteni, kaj la ĝenerala direktoro plugvidas UEA-n kiel li volas. Ĉu nun la estraro 2007–2010 aŭ la ĝenerala direktoro gvidas? Preskaŭ neniu ŝanĝo okazas, kaj la rolo de UEA ne estas klara. Estas preskaŭ nur la liverado de la revuo *Esperanto* kaj UEA-jarlibro al la membroj, la organizado de UK, eldonado de verkoj.

En la Esperanto-komunumo estas multaj tendencoj. UEA-gvidantoj malvarme rilatas kun aliaj E-asocioj, kiuj ne submetiĝas al ili, kaj eĉ rifuzas ilian kunlaboron. Eldonado de libroj kontribuas al la Esperanto-kulturo.

Ekster la Esperanto-komunumo UEA-gvidantoj preskaŭ nenion sukcese atingas. Estas klopodoj konvinki neesperantistojn, ke ili adoptu Esperanton aŭ almenaŭ rekonu ĝian valoron. UEA estas preskaŭ nekonata ekster Esperantujo. Oni ne vidas UEA-n en PEN-Klubo internacia, kaj la lasta partopreno de UEA en la konferenco de ALTE pere de ILEI estas nur formala.

2. La liverado de la revuo kaj jarlibro; eldonado de verkoj por Esperanto-kulturo, organizado de UK, sed kun aliaj E-organizaĵoj.

3. UEA ne plu havas multajn oficejojn kiel antaŭe. Tial ĝi ne bezonas ĝeneralan direktoron. Estu nur direktoro de la Centra Oficejo, kiu estas funkciulo de UEA ĉiam respondeca al la estraro/komitato/membraro, de kiu li ricevu direktivojn. La komitato estu aktiva, kaj la estraro estu forta en sia agado. Ĝi plenumu siajn funkciojn, kaj estu en kunlabora rilato kun la direktoro de la Centra Oficejo.

UEA estu en tre bonaj rilatoj kun ĉiuj aliaj E-organizaĵoj. Ĝi havu laborplanon kun ero tre grava koncerne tre sinceran kunlaboron kun aliaj E-organizaĵoj, ke ĉiuj E-organizaĵoj kunlaboru por la progreso de la ununura Esperantujo, kies elementoj UEA kaj aliaj E-organizaĵoj estas. Tiu kunlaborado certe naskos veran interhelpon, kiu profitigos al E-grupetoj kaj eĉ al izolitaj esperantistoj, ke iliaj agadoj, eĉ liliputaj, kontribuu al la disvastigo de Esperanto, nia komuna celo.

Ekster la Esperanto-komunumo UEA konigu sin kunlabore kun aliaj Esperanto-organizaĵoj. La reprezentigo de UEA kaj la Esperanto-Civito en la konferenco de ALTE en Kembriĝo en aprilo 2008 estas granda honto por Esperanto. Ĉu iu alia lingvo estis reprezentita de du organizaĵoj? Kial ĝuste Esperanto?

Ekster Esperantujo ni, esperantistoj, reprezentas Esperanton. Tio necesigas tre bonan prezentadon de la E-asocio(j). Por tio oni bezonas homojn, kiuj ne kontraŭiras regulojn en ĉiuj landoj. Ni devas atenti tabuojn, kiuj ege gravas en iuj medioj. Rememoru la penetradon de Blankuloj en la nigran Afrikon. Homojn kun tia haŭto oni konsideris parioj en afrikaj landoj. Estis malfacile al tiamaj afrikanoj akcepti tiujn homojn. Nun estas aliaj tabuoj por Afriko, kaj necesas, ke oni atentu tion en la propagandado de Esperanto en Afriko.

4. Iam SAT-ano asertis, ke SAT estas pli aĝa ol la nuna UEA, ĉar SAT fondiĝis en 1921 dum nuna UEA en 1947. Ĉiuj scias, ke la nuna UEA ne estas tiu, kiun fondis Hodler. Se oni parolu pri la apero de la litertrio UEA, oni prave asertos, ke ĝi (UEA) estas malkovrita en 1908. Sed se oni parolu pri la strukturo, ĝia funkciado laŭ nuna bazo komenciĝis ne en 1908.



Guojiang Wu (Ĉinio)
Komisiito de UEA pri ĝemelurboj

1. UEA devas ludi rolon por mobilizi aktivecon de membroj kaj lokaj Esperanto-organizaĵoj en la Esperanto-komunumo, kaj por reliefigi la nemankeblan funkcion kaj aktive kaj efike allogi al si maksimuman atenton de landaj registaroj kaj internaciaj organizaĵoj ekster la komunumo.

2. Ĉiu el la nunaj strukturoj de UEA devos esti konservata, precipe la Araba agado daŭre disvolviĝu, eksteraj rilatoj plie fortiĝu.

3. (1) Enkonduki raport-sistemon de komitatanoj. UEA havas tiom da komitatanoj, ĉiu el ili ĉiujare faras multajn laborojn, sed oni ne povas sufiĉe scii ilin. (2) Laŭkapable krei instigan sistemon por membroj. Ekzemple, ĉiujare UEA aljuĝe elektu kelkajn elstarajn membrojn kaj financu ilin partopreni internaciajn E-aranĝojn (ekzemple, UK). Se tiu sistemo stariĝos, ne plu okazos tiu situacio, ke neniu el Afriko aperis dum la Jokohama UK. (3) Pavimi vojon por esperantistoj, kiuj okupiĝas pri scienco kaj tekniko. Oni nefacile trovas en publikaĵoj aŭ interreto artikolojn aŭ disertaĵojn pri tekniko en Esperanto. UEA devas konsideri eldonon de jarkolekto pri ili. Estus bone se resumo de ĉiu verkaĵo havus version en aliaj lingvoj, tiel neesperantistaj fakuloj aktive serĉus esperantistojn, eĉ turnus sin al UEA, kiam ili arde ŝatus trovi verkon pere de tiu skizo.

4. Kun paso de tempo la politiko kaj la labormetodoj de UEA ŝanĝiĝas, sed mi opinias, ke ne ŝanĝiĝas la plej baza celo, t.e. disvastigi Esperanton.

AL LA ESPERANTISTARO

En Ĝenevo, la 28an de aprilo 1908, Hector Hodler fondis Universalan Esperanto-Asociacion. Nek la senmondmilita mondo de la tiama tempo, nek la ideo de universaleco, nek la sento de identeco de la esperantistoj restis la samaj ĝis la hodiaŭa tago, en kiu ni, kun ĝojo kaj ankaŭ kun porokaza penssiĝo, festas la centjariĝon de realaĵo nun ĝenerale rekonata kiel la reprezenta monda Esperanto-organizaĵo.

Mi volus tiun ĝojon dividi kun vi ĉiuj, kiuj ricevas mian mesaĝon. Indas dividi ankaŭ niajn ĉi-okazajn primeditojn. Historiistoj jam dediĉis al tiu ĉi jubileo klerigajn intervenojn. Sendube sekvos aliaj kontribuadoj; ni ne perdu ĉi tiun okazon, en kaj ekster la Asocio, ririgardi ĝian unuan jarcenton, kaj legi kontribuadojn de aliaj por firmigi nian kolektivajn konversacion same vigle, kiel ni tion faris okaze de la centjariĝo de la lingvo mem.

Feste salutas
Probal Dasgupta
prezidanto de UEA

Pli da lingvoj por la Eŭropa Unio

de Dafydd ab Iago el Bruselo

La Eŭropa Unio estas antaŭ akcepto de du novaj lingvoj — la kimra kaj la skotgaela. La brita eksterlandministrejo jam preparis tiusenkan peton al la slovena EU-prezidanteco. La letero, kiun sendos la brita konstanta reprezentanto ĉe EU, Kim Darroch, petos ke la du keltaj lingvoj aldoniĝu al la EU-lingvaro*. Estos petita de la brita registaro, ke la skotgaela kaj kimra havu la saman statuson en la EU-instancoj kiel la kataluna, eŭska kaj galega. La tri lastaj lingvoj aldoniĝis al la EU-lingvaro en 2005 post peto de la hispana registaro. Laŭ la decido de la EU-konsilio la parolantoj de la kataluna, eŭska kaj galega rajtas skribi al la EU-instancoj gepatralingve kaj ricevi respondon en tiu sama lingvo. Ministroj, kiuj parolas tiujn tri lingvojn, rajtas ilin paroli en la konsilio de ministroj.

Laŭ la sama logiko la 58.552 parolantoj de la skotgaela kaj 582.420 kiuj majstras la kimran, rajtos skribi gepatralingve. Iam ĉi-jare la EU-konsilio faros decidon kaj aldonos la du keltajn lingvojn laŭ la regulo adoptita 15 jun 2005. Tiam la EU-gvidantoj ŝanĝis la unuan regulon (leĝon) de la Konsilio, el la jaro 1958, kiu fiksas la lingvan regularon. La decido en 2005 ankaŭ aldonis la irlandan kiel plene oficialan lingvon de EU, sed ĝi ankaŭ enkondukis novan statuson de “kun-oficialaj” lingvoj sub bazo de “administracia aranĝo”.

Laŭ la iberia ekzemplo, Britio devos atingi administracian aranĝon kun la respektivaj EU-instancoj: la Eŭropa Parlamento, Komisiono, Komitato de Regionoj ktp. Laŭ la regulo de junio 2005, ĉiuj kostoj de la uzado de la kun-oficialaj lingvoj, devas esti pagitaj de la petanta membro-ŝtato. En la hispana kazo, la centra registaro en Madrido pagas la traduk-kaj interpretkostojn. Se civitano el Barcelono, Gasteiz, aŭ Santiago de Compostela skribas gepatralingve al slovak aŭ pola funkciulo de la Eŭropa Komisiono, la Madrida registaro unue pagas por tradukado hispanen. Poste la Komisiono devos traduki la hispanan version de la letero anglan (se la funkciulo ne komprenas la hispanan) kaj la respondo de la Komisiono, ofte en la angla, ankaŭ estos tradukita hispanen. Ĉi tiu traduko okazas je kosto de la eŭropa impostpaganto. Poste, je kosto de la hispana impostpaganto, okazas traduko el la hispana en la gepatran lingvon de la civitano — la eŭska, galega aŭ kataluna.

Kiam en 2007 la kulturministro el Eŭskio Miren Azkarate parolis eŭske, la interpretkostoj estis pagitaj de ĉiuj hispanaj civitanoj. Ŝi estis la unua ministrino, kiu parolis dum kunsido de la Eŭropa Konsilio en kun-oficiala lingvo. Kvankam la centra registaro en Hispanio pagas por ĉiuj hispanaj lingvoj — ĉu plene oficiala kiel la hispana aŭ nur kun-oficiala kiel la eŭska, galega kaj kataluna — Britio estas por alia sistemo. La centra registaro en Londono ne pagos por la skotgaela aŭ kimra. “Ĉi tio estas logika, ĉar estas peto de Kimrio kaj Skotlando”, — klarigis al *La Ondo de Esperanto* brita funkciulo en Bruselo. “Ne estas multe da korespondado inter skotaj civitanoj kaj la Komisiono. Do, mi ne atendas multajn leterojn en la skotgaela”, — klarigis alia funkciulo.

* Nun la eŭska, galega kaj kataluna estas “kun-oficialaj” lingvoj. Plene oficialaj lingvoj de EU estas la bulgara, ĉeĥa, dana, nederlanda, angla, estona, finna, franca, germana, greka, hungara, itala, latva, litova, malta, pola, portugala, rumana, slovak, slovena, hispana kaj sveda. La irlandano estas plene oficiala, kvankam laŭ la specialaj aranĝoj ĝi ankaŭ povas jure “manki” — kiel la malta ĝis 30 apr 2007.



Ĉu ankaŭ interpretistoj baldaŭ devos lerni aliajn novajn lingvojn de la Eŭropa Unio?

La Regulo de 2005 oficiale celis “... kadre de la peno faritaj por alproksimigi la Union al ĉiuj ĝiaj civitanoj, la riĉeco de ĝia lingva diverseco devas esti pli konsiderata”. La Konsilio antaŭvidis traduki EU-leĝojn al kun-oficialaj lingvoj kaj aldoni ĉi tiujn tradukojn al siaj arkivoj. La Konsilio ankaŭ disponigus — je peto de civitanoj — kopiojn de ĉi tiuj tradukoj. Tamen ĉi tiuj tradukoj ne havas la statuson de leĝo, kaj ili, same kiel paroladoj kaj aliaj komunikoj, estu farataj je kosto de la petantaj ŝtatoj — nuntempe nur Hispanio.

Ne ĉiuj estas kontentaj pri la dua-ranga statuso de “kun-oficiala” lingvo. Temas ne nur pri la kosto, sed ankaŭ pri la oficialeco. Ministroj el Katalunio, Galegio kaj Eŭskio devas informi la Konsilion, ke ili parolos gepatralingve, monatojn antaŭ la koncerna kunveno. Civitanoj, kiuj skribas gepatralingve, devas atendi respondojn plurajn semajnojn post aliaj, kiuj uzas unuarangajn EU-lingvojn. Jam oni pensas, kiel oni atingi plenan oficialecon por la nuntempaj “kun-oficialaj” lingvoj. “Vojo antaŭen povas esti plena oficialigo de la kataluna, eŭska kaj galega en Hispanio”, — klarigis funkciulo de la kataluna registaro en Bruselo. Tio signifus, ke la kataluna, eŭska kaj galega fariĝus oficialaj lingvoj en Hispanio en la sama maniero, kiel la nederlanda, germana kaj franca estas oficialaj lingvoj en Belgio. “Tiam niaj lingvoj fariĝus plene oficialaj lingvoj en la EU”, — diris la kataluna funkciulo.

Sub la Regulo numero 1 el 1958, la Konsilio de la Eŭropa Unio donas oficialan statuson al lingvo kiu estas oficiala sur la teritorio, ankaŭ parte, de membro-ŝtato kaj kies statuso estas agnoskita de la konstitucio de la membro-ŝtato. La membro-ŝtato mem devas peti la oficialigon de la lingvo. Tion ne faris Irlando ĝis 2005. Kipro kaj Luksemburgio ankoraŭ ne petis la oficialigon de iliaj respektivaj aliaj lingvoj, nome la turkan kaj luksemburgan. Evidente, la batalo por la EU-oficialigo de la kataluna, eŭska kaj galega okazos je enlanda nivelo, kaj nur poste plene oficialiĝos aliaj lingvoj kiel la skotgaela kaj la kimra.

RADIO	<i>Radio Esperanto</i>
	<i>Halina kaj Aleksander parolas el Kaliningrado</i>
ESPERANTO	Podkasta servo de <i>La Ondo</i> Aŭskultu: http://la-ondo.rpod.ru



Pri marginaj konsideroj en la recenzo de Sergio Pokrovskij

Plezure mi legis la kvar “galopojn” de Sergio Pokrovskij en LOdE №1,2,3,4 2008 pri la nova eldono de la Biblio. “Galopoj” pro tio, ke, kvankam ili estas detalaj, fronte al objekto tiom vasta, la atento povas esti nur forglitiĝa. La bibliaj sciencoj estas tiom multaj, ke eĉ la plej pasia kaj konstanta bibliisto konscias, ke li mem estas ĉiam margene de la biblio. Ĝuste pro tio, post sinceraj admiroj por Pokrovskij, mi volus aldoni ion margene de iuj liaj asertoj, margene ankaŭ rilate la recenzon mem, ĉar mi apenaŭ enmanigis al mi la novan Biblion el la manoj de amiko.

Pokrovskij ŝajnas tre malkontenta pri la Nova Vulgato, komisiita de Paŭlo la Sesa kaj aprobita de Johano Paŭlo la Dua (1979). Li ĝin difinas “malfeliĉa”. Se tiu *malfeliĉa* pravigus per kritikoj al la teksto, oni povus pridiskuti tiujn tekstojn, sed al li malplaĉas la afero en si mem.

Ĉu adekvatigi la Vulgatan version al la novaj sciencaj filologiaj kaj ekzegezaj akiroj pri la Tanaĥo kaj la grekaj fontoj ĝenas kelkajn? Ĉu ne utilas por la studemuloj kaj konsultantoj posedi tekston pli korektan ol la antaŭa, kaj ĉu ne estas devo de honesteco, sendepende de ĝia uzado en liturgiaĵoj, prezenti la pli “veran” tekston? Certe la nova versio vipetas ĉiujn pasintajn nacilingvajn versiojn, sed tio, eĉ se “malfeliĉaĵo”, certe pliigas la komprenadon de la Biblio. Eventuala kritiko, laŭ mi, devus referenci al la enhavo, se tiun ĝi meritas.

Pokrovskij elvokas belan distingon inter *puno* kaj *turmento* [4] rilate al la “damnitaj en la infero”. Tiu distingo, ĉiam pli komuna inter kristanaj dikredantoj, estas certe plikomprenejo pri tiu kredgravaĵo. Li indulgas atribui la emon vidi dian “punon” al la katolikaro infektita el romia jurismo, laŭ kiu ankaŭ Dio aplikas homecan leĝon: kiu malobservas normon tiu pagu per puno! Kaj tiel Dio fariĝus violenta punanto, tute ne akceptebla aparte en nia tempo, kiam oni hororiĝas antaŭ la perforto sugestata de la monoteisma Dio mem en diversaj malnovaj bibliaj tekstoj. Se, male, la damno mem elektas sian punon (turmentiĝon), Dio savus sian reputacion.

Mi volus substreki du aferojn tiurilate. Unue, ankaŭ ĉe la katolika teologia pensado tiu distingo estis ĉiam alesta en la katekizado pri la kaŭzo de la sufero de la inferaj damnitaj: nome, la doktrino pri libera krejĝo de sia turmento, implicite kaj eksplicite, trairas la tutan teologian historion ankaŭ ĉe la teologoj katolikaj. Due, ĉu vere per tiu distingo oni pli savus la “honoron” de Dio? Ĉu Dio, laŭ la kristana kredo, ne estas aŭtoro ankaŭ de la sekvoj de la mava elekto de la libera homo? Ĉu Dio ne povus indulgi, modifante eventuale, la sekvojn de la peko? Kaj se li tion ne faras, ne sekvas ke, laste-laste, estas mem la punfaranto? Ĉu la memoro mem pri tiu turmentiĝo ne estus vundo en la dia senmakuleco?.. Tamen estas certe fonto de ĝojo, ke en la ortodoksa eklezio tio havas tioman valoron.

La samon oni rajtas diri pri la infero kaj purgatorio, konceptataj pli kiel (anima-psika) *stato* ol kiel puna *loko* [4], nome kiel io ekster spaco kaj tempo. Pokrovskij opinias, ke

tiu ŝanĝo datiĝas el la pasinta jarcento. Al mi ŝajnas, ke tiu datiĝo estas tro tranĉa, ĉar tiukaze necesas dividi la popoleskan kaj sendetalan katekizan transdonon de la kredo, adaptiĝantan al la diversa sentebleco, el la teorumado de teologioj, en kiuj neniam mankis la konceptado pri *stato*. Cetere la transiro al tiu konceptado estas facile deduktenda el la analoga *stato* rilate la Paradizon: se tiu ĉi estas *state* “esti kun Kristo” (Johano), la infero estas *state* “ne esti kun Kristo”.

Oportune kaj klare Pokrovskij insistas en la komparo, riĉa je malsamaĵoj inter Ades kaj Ŝeol kaj Infero kaj Hel [3,4], el kiuj ĉiu brilas per sia specifeco. Sed en ĉiuj brilas precipe la koncepto de transvivo de la animo post la korpa morto, nome ke la vivo ne finiĝas ĉi-tere. Kaj certas, ke inter postekzilaj hebreaĵoj ŝeolo ektenis ankaŭ la malsaman sorton de la bonuloj kaj la malbonuloj, same kiel jam en diversaj kulturoj, kiel en la greka (ekzemple, Platono en *Gorgias*), kaj invadas la tutan egiptan kulturon... Pro tiuj similaj aspektoj mi kredas, ke ĉiu el tiuj vortoj ne maltaŭgas ricevi kion faris Kristo el la tombo (laŭevangeliie li *malsupreniris*...), se ni limiĝas al la aspekto materia de la priskribo. Sed apenaŭ iu enpensiĝas pri la Biblio, ĉiu esprimo fariĝas maltaŭga. Ni scias, ke por la evangelioj Kristo estas la Difilo, la Logos, kiu elvenas el la sino de la Patro, la Savanto kaj la Vojo tra kiu pasas ĉiu kreaĵo, kaj trovas ekziston kio ekzistas... Kiel esprimi tiun realon? La evangeliisto igas tiun, kiu “venis inter la siaj”, preni posedon de la tuta kreaĵaro, eĉ de la ŝeola mondo sendepende de tio, kio ĝi estas: “kaj malsupreniris en...” La evangelia informo estas nur instrumento por komprenigi, kio estas Kristo. Nome, halti ĉe la diferencoj lokaj-spacaj kaj konceptaj de tiuj vortoj ne multe utilas, se ne malutilas.

Pokrovskij iom riskas kiam asertas, ke la dekreto de la Trenta Koncilio, difinanta la kanonan liston de la libroj diinspiritaj, ne estas dogmo, ĉar “unu koncilio difinas, alia povas ŝanĝi” [2]. Riskas ricevi korekton! Fakte, por la katolika eklezio (temas pri la oficialaj instruoj de tiu eklezio) la Trenta Koncilio estas ekumena kaj dogmiga (kiam ĝi dogmigas). Mi neniam aŭdis pri tiukredaj teologoj diri la kontraŭon, nome ke en tiu listo povas esti forviŝita iu libro el la deklarataj diinspiritaj. Se antaŭe aliaj koncilioj, lokaj aŭ regionaj, alie dekretis, nun ili trovis la definitivan respondon al la problemo!

Iom riskemas ankaŭ la avizo, ke oficialaj instruantoj (nur tiuj pravigas) katolikaj ekakceptas, ke la duekanonaj libroj havu malpli da aŭtoritateco [2]. La vortoj *proto-* kaj *deŭterokanonaj* (*unue-* kaj *due-* kanonaj) estas certe malfruaj, kiel diras Pokrovskij, sed la konceptoj estis samtempaj kun la diskutoj: *unuekanonaj* estas la libroj agnoskitaj kiel diinspiritaj de ĉiuj eklezioj; *duekanonaj* estas tiuj libroj, kiujn ne ĉiuj eklezioj tute frue vidis aŭ ricevis dubante pri ilia “dia” origino, sed agnoskitaj samoriginaj ili ricevis la saman aŭtoritatecon.

Kiel oni vidas, ankaŭ mi faris “galopon”, esperante, ke mi sukcesos evitigi miskomprenojn, malantaŭ kiuj eble naskiĝas io de mia deziro enŝoviĝi tra la teologiaĵoj de Pokrovskij, kiu certe eĉ pro tio distingiĝas en nia Esperantujo.

Armando Zecchin

Pri la aŭtoro

Armando Zecchin naskiĝis en 1924 en Italio. Magistriginte pri teologio, instruis klasikajn lingvojn kaj teologion. Post la emeritiĝo en 1995 lernis Esperanton ĉe Ada Sikorska-Fighiera. Altiris al Esperanto kelkajn gejunulojn kun kiuj esperantigis kelkajn verkojn el la itala kaj el la greka kaj tradukis el Esperanto en la italan. Kompilis *Compendio italiano-esperanto di termini religiosi*. Gastas, kiel artikolisto, en diversaj Esperantaj revuoj.

Pekinistoj kaj Tibetemaj

Kiuj defendas la rajtojn de Tibeto en Esperantio? Certe la Konsulo de la Esperanta Civito, ankaŭ ĉar al tio lin devontigas rezolucio unuanime aprobita de la Senato lastan aŭguston (la ruĝa grupo ne partoprenis en la baloto).

Tibetema estas Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, per deklaro de sia prezidanto, Daniele Vitali. Nia plej tibetema retejo estas tiu de Gebeleizis, rumano (huculo) vivanta en Nov-Jorko. En lia www.bendisplanet.blogspot.com situas amaso da interesaj informoj kaj bildoj pri Tibeto.

Kompreneble Pekino uzas esperanton plede al sia politika vidpunkto: la retejo de *El Popola Ĉinio* kaj la esperanto-elsendoj de Ĉina Radio Internacia klopodas mobilizi la apogon de la esperantistaro. Al ili referencas ankaŭ Raporto.info, la novajagentejo fondita de panamano kaj donacita al ĉinoj.

Sed ankaŭ nedungitoj de la ĉina ŝtato mobiliziĝas en Esperantio. La plej arda subtenanto de Pekino estas la prezidinto de UEA Renato Corsetti. Sur lia linio estas pluraj komunistoj, precipe tiuj kun rilato al Kubo. Vilhelmo Lutermano tradukadas pekinismajn artikolojn en *Le Monde diplomatique*. La pekinistoj precipe emfazas la “fian feŭdecon de la antaŭa epoko”. Ili diskonigas pri tio en “neŭtralaj” diskutlistoj: tiel agis interalie Luis Ĉordova (meksikano kun kuba edzino) ĉe Meksika Esperanto-Federacio. Plejparte la UEA-anaro akceptas tion tute pasive. Kaj SAT? Nenio.

HeKo

Bedaŭrinda recenzo

Nur nun, do iom malfrue, mi legis la bedaŭrindan recenzon de iu Glebo Malcev pri la filmo *Gerda Malaperis*, kiu aperis en la januara numero de *La Ondo de Esperanto*.

Tiu sinjoro havas nenian konsideron pri la laboro farita. Unue li prijuĝas la filmon laŭ la kriterioj uzataj por kritiki komercan (holivudan) aŭ artan filmon. Ne eblas. Estas evidente ke Joe Bazilio kaj skipo ne pretendis tion. Ili simple filmis la historion rakontatan en la lernolibro tia kia ĝi estas. En sia deziro elstarigi nur la malbonajn flankojn de la laboro farita, li simple ne mencias, ke la filmo, ekzemple, havas kaj bonan fotografaĵon kaj klaran sonon, kio ĝenerale malestas en aliaj produktaĵoj esperantaj. Mi dubas ĉu s-ro Malcev estus same rigora, se temus pri filmo produktita de iu eŭropano.

Aloísio Sartorato (Brazilo)

Helpu savi knabinon

En “speciala” ŝtato Trans-Dnestrujo kun neimageble subnivela medicino, vivas trijara bebino, Oljo Verbanova, kun organika cerba lezo — malignega epilepsio kun West-sindromo (40-60 atakoj tage). Ŝi bezonas longan kuracadon kaj nun havas esperon je ia saniĝo post multkosta operacio en Germanujo. Se vi konsideros helpi, bv. kontakti ŝian panjon Irina Verbanova:

✉ Pridnestrovje, Moldova, Bendery, ul. Lenina 26 kv.13

📧 verba77@list.ru

☎ +373 (552) 20187

Vi ankaŭ povas vidi la hejmpaĝojn pri Oljo far ŝiaj gepatroj (<http://verba77.3dn.ru>), legi ilian “Vivan Taglibron” (<http://verba77.livejournal.com>), kaj trovi detalojn pri la bankkontoj kaj iom da klarigoj en Esperanto ĉe: <http://aandrejpe.livejournal.com>

Dankon!

Nombroj sen komentoj

Kiuj manĝas plej multe?

Usona prezidento Bush malkovris, ke pri la prezokreskado por manĝaĵoj kulpas la mezklasaj baratanoj, kiuj riĉiĝas kaj manĝas pli multe, altigante la prezojn en la tuta mondo. Barataj politikistoj kaj gazetoj protestis, ja laŭ ili la plej manĝemaj en la mondo estas usonanoj. La averaĝa usonano manĝas tiom da kokaĵo, kiom manĝas 23 baratanoj; krome, nutraĵoj en Usono estas ĉiam pli uzataj kiel biologia fuelo. Vidu la tabelon el *Times of India* pri averaĝa unujara popersona manĝado:

	Kokaĵo	Lakto	Oleo
Usono	45,4 kg	78 kg	41 kg
Eŭropa Unio	16,2 kg	69 kg	46 kg
Barato	1,9 kg	36 kg	11 kg
Ĉinio	8,3 kg	11 kg	18 kg

Ĉu kaj kial (ne)vojaĝi?

Laŭ opinisondado de la fondaĵo *Socia Opinio*, dum la lastaj tri jaroj nur 6% da ruslandanoj vizitis iun el la 14 aliaj landoj de eksUSSR kaj nur 4% estis en la “fora eksterlando”. Plej multe vojaĝas moskvanoj — 17% estis en la landoj de eksUSSR kaj 12% en aliaj landoj.

58% el la respondintoj ne vojaĝas eksterlanden pro monmanko, 6% pro neeblo forlasi la laboron, 3% pro personaj problemoj, po 1% pro sanproblemoj kaj pro maljunaĝo. 27% respondis, ke ili ne vojaĝus al eksterlando eĉ se ili havus monon por vojaĝo. 63% veturus, se ili havus monon, kaj 10% ne respondis. Inter la vizitendaj landoj oni plej multe nomis Francion (12%), Italion (10%) kaj Germanion (8%).

Internacia Esperanto-Konferenco – 2008 en Slovenio, 12–18 jul 2008

Ŝempeter pri Gorici / Ŝempeter ĉe (Nova) Gorica

Temo: Fernando DE DIEGO, vivo kaj verkaro

Organizanto: *Orbis Pictus* de Viŝnja Branković, ✉ Via Parini 5, 34129 Trieste, Italio ☎/fax +39/040 767875 📧 orbispictus@iol.it

Konstanta adreso: Éric Laubacher, kasisto de OSIEK ✉ 1, rue de Bougainville, 78180 Montigny le Bretonneux, Francio ☎ +33 1 30 96 67 91 📧 kasisto@osiek.org

inter Ljubljana (100 km) kaj Venecio (150 km)

en regiono de najbarbaroj Nova Gorica (Slovenio) kaj Gorizia (Italio) proksime al maro kaj montaro, mondfamaj grotoj...



Ĉiutagaj prelegoj sekvataj de debatoj. Libroservo Suspensa voĉdonado por OSIEK-premio 2008

bona internacia etoso de negranda aranĝo • favoraj kondiĉoj kaj prezoj • allogaj proksimaj ekskursoj posttagmezaj ekskursetoj dum la konferenco

Postkonferencaj ekskursoj (dum tri tagoj) aŭ/kaj kunvojaĝo al 93a UK en Roterdamo! VI ESTU BONVENA!



La unua esperantista ĵurnalisto

Du malnovaj artikoloj de Ludoviko Zamenhof

Ĉu ni progresas?

Ĉiun fojon, kiam la bruo en nia afero iom trankviliĝas, kiam pasas kelka tempo sen novaj videblaj faktoj, ni ricevas de kelkaj amikoj la demandon: «ĉu nia afero progresas aŭ ĉu ĝi haltis?» Kelkaj el niaj amikoj pensas, ke afero progresas nur tiam, kiam ĝi bruas; tial la humoro kaj opinio de tiuj ĉi amikoj kun ĉiu tago alie ŝanceliĝas: kiam ili trovas en nia gazeto multajn konsolajn novaĵojn, ili ekkrias: «vivu Esperanto! ni iras, ni venos, ni atingos baldaŭ la celon!» kiam pasas kelka tempo sen novaj aperoj, tiuj ĉi amikoj venas al la konvinko, ke ni staras sur unu loko aŭ ke ni eĉ mortas — kaj ili perdas la kuraĝon kaj lasas fali la manojn. Tamen egale senkaŭzaj estas la tro granda ĝojo en la unua okazo, kiel ankaŭ la malĝojo en la dua.

Ni iras antaŭen regule. La celo lumas al ni ĉiam tiu sama, kaj, ĉu hodiaŭ la cirkonstancoj estas pli favoraj, morgaŭ — malpli kaj postmorgaŭ denove pli — la veraj amikoj de nia ideo laboras trankvile kaj kun egala animo. De flanka bruo kaj de ekstera ŝajno neniel dependas la sorto de nia afero.

Ni devas brui, kiom ni povas, ni devas peni, kiom ni povas, krei ĉiam novajn faktojn por la okulo, ĉar ... la blinda amaso tion ĉi amas kaj povas esti altirata la plej bone per tia maniero (la fakto, ke ni bedaŭrinde ne havas ankoraŭ la eblon, por sufiĉe brui kaj fari reklamon, multe malhelpas al ni en la altirado de la amasoj); sed por ni mem tiu ĉi bruo aŭ silento ne povas esti mezurilo de nia progresado

aŭ starado. Plej granda bruo kaj ekstera brilo povas kovri sub si objekton tute senfundamentan, putran, mortantan aŭ jam mortintan, dum kontraŭe, nokta mallumo kaj morta silento povas kovri sub si objekton, regule kaj energie kreskantan kaj disvolviĝantan. Ni lasu al la amasoj taksu la aperojn laŭ ilia ekstera brilo; se la amaso nun adoras ian luman meteoron, nenio ĝin detenas post kelkaj minutoj tute forgesi pri la meteoro, kiam tiu ĉi perdos sian malveran lumegon; se la amaso hodiaŭ silente rigardas aferon, malrapide sed konstante disvolviĝantan, tio ĉi ne detenas la amason morgaŭ aliĝi al la afero nerimarkite kaj tiri el ĝi utilon. Ni lasu al la amasoj juĝi la faktojn laŭ ilia ŝajno; kiam ni mem volas scii, ĉu nia afero progresas aŭ ne, ni devas esplori la faktojn internajn.

Se venos iam la tempo, kiam la tuta mondo scios kaj uzos la lingvon Esperanto, tiam — neniu dubos — ni povos kuraĝe diri, ke nia afero absolute atingis la celon. Ju pli multe da homoj ekscias kaj ekuzas nian lingvon, des pli multe ni proksimiĝas al nia celo, des pli multe ni progresas. Sekve la sola efektive vera montrilo, ĉu ni progresas aŭ ne — estas la kreskado aŭ nekreskado de la nombro de esperantistoj. Ĉio alia estas nur rimedoj, sed ne faktoj. Se eĉ la tuta mondo bruos pri nia afero, se nia afero brilos en ĉiuj publikaj lokoj, sur ĉiuj ekspozicioj de la mondo k. t. p., sed la nombro de la personoj kiuj ellernas kaj uzas nian lingvon ne kreskos — tiam ni malgraŭ la ŝajna potenco devos diri, ke nia afero mortis, ke ĝia lumo baldaŭ estingiĝos, kiel la lumo de minuta meteoro; sed se eĉ la tuta mondo silentos, se ĉiuj obstine kovros antaŭ ni la okulojn kaj la orelojn, se nia afero longe ankoraŭ restos tute nekonata en la plej granda parto de la mondo, sed se la nombro de la esperantistoj regule, se eĉ malrapide kreskados, — ni povos kuraĝe diri, ke ni regule progresas, ke ni regule iras

antaŭen kaj ke la estonteco apartenas al ni...

Se Vi deziras scii la staton de nia afero, ne serĉu en nia gazeto en la rubriko «Nia afero», kiu prezentas eksterajn; serĉu en la rubriko «Novaj Esperantistoj», kiu estas la plej grava rubriko de nia tuta gazeto. Tiu ĉi rubriko estas ankoraŭ malgranda, sed ĝi estas konstanta, ĉiu numero de nia gazeto alportas regule novan serion da novaj esperantistoj, kaj tio ĉi donas al ni la plej bonan garantion por la estonteco, tio ĉi montras la plej klare, ke ni regule progresas. Se ĉiu amiko penos alportadi ĉiam novajn ŝtonetojn al la konstruo de tiu ĉi rubriko, ĝi kreskados pli kaj pli, eliros el la kadroj de nia malgranda gazeto kaj fariĝos iom post iom potenca memstara organo kun centoj kaj miloj da novaj nomoj en ĉiu numero. Ju pli riĉa estos la dirita rubriko, des pli grandaj fariĝos niaj fortoj kaj des pli bone iros jam per si mem ankaŭ ĉiuj aliaj flankoj de nia afero. Kaj kiam fine la numeroj en tiu ĉi rubriko atingos potencon altecon kaj la kolektitaj nomoj prezentos tutan grandan popolon, tiam ni povos ĝoje gratuli al ni, ke ni sen bruo venkis la mondon. Kaj tiu tempo venos!

Esperantisto, 1892, №9.

Pseŭdo-esperantistoj

De tempo al tempo ni ricevas de diversaj flankoj leterojn pli malpli en la maniero de la sekvanta letero de s-ro X., kiu kuŝas nun antaŭ niaj okuloj: «Jam longe mi ne skribis al vi, kaj vi kredeble jam pensas, ke mi, kiu estis iam varma amiko de la lingvo Esperanto, nun jam forgesis pri ĝi. Se vi tiel kredas, vi eraras. Mi ĉiam restos varmega amiko de Esperanto kaj mi neniam ĝin forgesos. Sed kiam mi komencis sisteme labori por Esperanto, mi renkontis tiom da malfacilaĵoj, ke mi vole-ne-vole devis lasi fali

la manojn, kaj venis al la konvinko, ke nun la mondo ne estas ankoraŭ matura por tia granda ideo. Sed estu tute certa, ke kiam nur la cirkonstancoj ŝanĝiĝos kaj la surdeco kaj indiferenteco de la mondo pasos, vi tuj vidus min en la vicoj de la plej energiaj batalantoj. Skribu al mi, kion nia afero faris de la tempo, kiam mi ĉesis esti aktiva esperantisto; kiom da amikoj la afero nun havas? kiaj novaj verkoj eliris? Se la «Esperantisto» ankoraŭ eliras, sendu al mi ian numeron de ĝi. Entute estus bone, se vi de tempo al tempo sendus al mi ian novaĵon pri Esperanto, por ke mi ne tute forgesu pri ĝi...» k. t. p. k. t. p.

Ne vere, amikoj, kia edifa kaj grandanima maniero de pensado? Kiam dank' al niaj senlacaj, paciencaj kaj malfacilaj laboroj nia ideo fine venkos, kiam ni povos iam deviŝi la ŝviton de niaj fruntoj kaj post la eternaj ĉagrenoj, malagrabraĵoj kaj mokoj levi la kapon kaj rigardi kun plezuro la fruktojn de nia laborado, tiam sinjoro X. tuj aliĝos al ni kaj post la venko li fariĝos unu el la plej energiaj kunbatalantoj!! Dume «la mondo ne estas ankoraŭ matura», kaj tial s-ro X. en tia grado ne povas esti «aktiva esperantisto», ke li ne povas eĉ ... por sia propra persono aboni la «Esperantiston», kiu «havas por li ĉiam grandan indon», kaj sian aldonitecon al nia afero li esprimas per tio, ke li petas nin, havantajn tro multe da libera tempo, skribadi al li de tempo al tempo letere pri la stato de nia afero!!

Ne, sinjoroj pseŭdo-esperantistoj! Estas vero, ke ĉia nova utila ideo en la komenco devas tre malfacile batali kaj pli aŭ malpli frue ĝi venkas. Sed kiam dank' al nia konstanteco la mondo fine ĉesos esti surda al niaj vortoj kaj nia afero ĉesos esti «fantazio, pri kiu la bona tono postulas, ke oni ĝin moku, ne esplorinte ĝin», kiam Esperanto estos ĉie akceptita kaj sankciita, — tiam ni vin ne bezonos, sinjoroj pseŭdo-esperantistoj. Vi faris malgrandan proveton de laborado, kaj, kiam ĝi restis sen deca sukceso, vi tuj ĉesis! Sed se nia laborado apartenus al tiuj dankoportaj aferoj, kiuj estas kronataj de tuja granda sukceso, tiam ni ja facile trovus milionojn da laborantoj kaj tiam ni ja vin ne bezonus! Vi ĉiuj (via nombro estas jam tre granda), kiuj

staras nun kaŝite kaj atendas, — ne promesu aliĝi al ni, kiam la mondo maturiĝos, ĉar tiam ni jam ne bezonos maturigantojn kaj post la venko ni ne bezonos helpantojn. Se vi amas nian ideon, laboru por ĝi nun, kiam ĝi bezonas laborantojn; batalu por ĝi nun, kiam ĝi postulas ankoraŭ malfacilegan bataladon; staru forte kaj nekaŝite, kiel granito inter ondoj, nun, kiam la malfavoraj cirkonstancoj tion ĉi postulas; oferadu malavare nun, kiam monaj rimedoj estas por ni eksterordinare gravaj kaj enhavas en si la demandon: «esti aŭ ne esti».

Ĉia nova ideo devis batali longe kaj malfacile, kaj vi, sinjoroj X. kaj similaj, kiuj ĝuas nun la dolĉajn fruktojn de tiuj ideoj, vi eble ne havas eĉ supozeton pri la maldolĉa ŝvito, kun kiu oni siatempe semis tiujn ideojn. Ni, veraj amikoj de lingvo tutmonda, scias tion ĉi tre bone, kaj ni laboras pacience, pacience, pacience, kaj nek la tuta terura surdeco, kiu regas ĉirkaŭ ni, nek la malkuraĝiĝaj, malesperigaj batoj de la sorto, kiujn ni renkontas sur ĉiu paŝo, forpelos nin de nia vojo. Armitaj per tiu ĉi fera pacienco kaj per la konscio de la vereco de nia ideo, ni iras antaŭen malgraŭ la malhelpoj, kiuj baras ĉiun nian paŝon, kaj ni ne dubas, ke pli aŭ malpli frue ni venkos. Sed vi, sinjoro X. kaj milionoj da similaj personoj, kiuj preferas atendi, ĝis la ideo nun mokata kaj persekutata fariĝos ideo moda, atendu trankvile, — sed ne nomu vin esperantistoj. Ni batas nun la dikegan muron, kiu staras inter la popoloj; cent batoj restas sen rezultato, sed ni ne perdas la kuraĝon kaj estas kontentaj, kiam la centunua elrompas unu brikon. Enea estas tiu ĉi malrapida laborado, sed ni ĝin ne ĵetos. Kaj kiam la milionoj da internaj fendoj, kaŭzitaĵoj de niaj paciencaj batoj kaj ĝis nun tute kaŝitaĵoj, subite ekefikos, kiam la murego, subrompita en diversaj lokoj, en unu bela mateno per unu fojo kun grandega bruo subite disfalos, tiam vi, miopuloj, miros, kiel ĝi okazis, kiam ja hieraŭ ankoraŭ 99/100 de la murego staris netuŝita; tiam vi alkuros al ni, grandanime helpos al ni triumfi la venkon kaj vi diros: «ni laboris». Sed la historio tiam ne silentos, sed diferencigos inter la laborintoj kaj atendintoj.

Esperantisto, 1893, №6.

En la unua plenkunsido de la mondkongreso de esperantistoj-ĵurnalistoj, kiu okazos fine de majo en Vilno, la redaktoro de *La Ondo de Esperanto* prelegos pri Ludoviko Zamenhof kaj gazetaro.

Efektive, Ludoviko estis ne nur lingvoaŭtoro, vortaristo, verkisto, tradukanto, movadorganizanto kaj ideologo, li estis ankaŭ ĵurnalista.

Li verkis artikolojn en *Razsvet* pri judaj temoj antaŭ la apero de la *Unua Libro*. Sian Lingvon Internacian li ekdisvastigis per anoncoj en gazetaro, kaj preskaŭ tuj post la lanĉo de la lingvo li klopodis eldoni Esperanto-gazeton.

Ne sukcesinte en 1888 en Ruslando pri *La Internaciisto*, li en 1889 iniciatis (*La*) *Esperantiston*, kaj estis ĝia redaktoro ĝis la lasta numero (1895).

Ankaŭ poste Zamenhof kunlaboris en gazetoj, interalie, en *Ruslanda Esperantisto*. Dum 1906–1914 liaj verkoj ofte aperis en *La Revuo*. Atentindaj estas lia intervjuo en *Jewish Chronicle* (1907), liaj intervjuoj pri naciaj problemoj en *Di Varhajt* (1912) kaj en *Pola Esperantisto* (1914), kiuj estis represitaj en *Mi estas homo* (2006).

La du apudaj artikoloj de Zamenhof el la *Esperantisto*, ebligas senti la etoson de la pionira epoko de Esperanto kaj la stilon de la unua esperantista ĵurnalista.

Atko



Paĝoj el la historio de la Sukcena Lando (11)

de Halina Gorecka

Reĝo-soldato

Frederiko-Vilhelmo I estis neordinare ŝparema; elspezoj por luksaĵoj estis eliminataj el la buĝeto, kaj ĝi reduktiĝis sesoble. Li celis krei fortan armeon, kaj la reĝo sukcesis pri tio. Dum lia regado la armeo kreskis de 38 mil ĝis 80 mil soldatoj. Por tio necesis alfluo de monrimoj, kies fonto devus esti la Pruslanda provinco. Ĝuste por plibonigi la ekonomian staton de la provinco estis realigita “retablismend” — procedo de rekonstruado de la ekonomio en la orienta provinco de la reĝlando. Tion celis la koloniado priskribita en la antaŭa parto.

Sed la reĝo ne deziris akcepti iun ajn; de la novaj regatoj li postulis laboron kaj obeon. Li iniciatis devizon de la pruslanda monarkio: “Nicht raisonniren” — Ne rezoni! Laŭ li, la menonitoj tro multe rezonis, kaj li ne bezonis tiujn idealserĉantojn. Li ordonis, ke la menonitoj pro rifuzo servi en armeo forlasu la reĝlandon, kaj nur protesto el Kenigsbergo, ke tio reduktos kolektatajn impostojn, decidigis lin rezigni pri sia postulo. Ja li nomis sin ministro de financoj kaj arma ministro de la pruslanda reĝo. Ĉi-foje venkis la financministro.

Estas konata la pasio de Frederiko-Vilhelmo al soldatoj-granduloj, kiujn li nomis “miaj karaj longkruraj bravuloj”. Neniu potenco povis defendi altstaturajn kompatindulojn kontraŭ liaj arogaj varbantoj. Foje liaj agentoj kaptis en Italio eĉ predikanton apud la preĝeja katedro.

La reĝo postulis, ke la kolonianoj ekloĝinte en lia reĝlando, ne pensu pri reveno al sia patrujo. Foriro por li aspektis kiel dizerto. Kiam kelkaj ĉelimaj litovaj kamparanoj, persvaditaj de poloj, foriris al Pollando kunpreninte tutan sian brutaron kaj domhavaĵon (inkluzive fenestrojn kaj pordojn), la reĝo koleriĝis kontraŭ la tuta Pollando kaj ordonis, ke oni malakceptu polojn kiel kolonianojn.

Li malfermis multajn lernejojn, opiniante: “ĉu mi havos multan utilon, se mi loĝigos en la lando terkulturistojn, sed ne faros ilin bonaj kristanoj?”

Reĝurbo

Grava evento okazis dum la regado de Frederiko-Vilhelmo I. Dum kelkaj jarcentoj sendepende unu de la aliaj ĉe la rivero Pregel ekzistis kastelo Kenigsbergo kaj la tri mezepokaj urboj: Altstadt, Kneiphof kaj Löbenicht.

Ilian sendependecon substrekis eĉ muro, dividanta la urbojn Altstadt kaj Löbenicht. La urboj havis siajn proprajn reg-organojn kaj ofte konfliktis inter si. En la 20aj jaroj de la 17a jc sub la minaco de la sveda invado oni decidis konstrui komunan defendomuron. Iom post iom tiu konglomeraĵo akiris unuecan nomon — Kenigsbergo, unue en la ĉiutaga vivo, poste ankaŭ en la oficialaj dokumentoj.

La unuigo permesus ŝpari la administrajn kostojn. Sed gravis ankaŭ ŝtataj konsideroj. La lando plu estis enklavo, kaj ĝi devis grave roli kiel reprezentejo de la reĝlando. Ĝi devis posedi sian centron, kiu ebligus dece reprezenti la reĝan potencon kaj efektiviĝi diplomatan, ekonomian kaj aliajn agadojn. Estis bezonata grandurbo, ĉirkaŭ kiu formiĝus politika, ekonomia kaj kultura vivo.

Finfine, en 1724 la tri urboj unuiĝis kiel Kenigsbergo. Ekde tiam ĝis la fino de la Germana Imperio (1918) Kenigsbergo titoliĝis reĝa pruslanda ĉefurbo-rezidejo.

La Reĝa kastelo

La kastelo aperis sur la loko de la prusa setlejo unue kiel ligna fortikaĵo. Poste oni transformis ĝin al la ŝtona. La fortikaĵo komencis akiri trajtojn de kastelo. Ĝis 1327 ĝi servis por la estro de la teŭton-ŝtata distrikto, poste por la marŝalo, por konvento, kies masiva konstruaĵo situis centre de la fortikaĵo. Ekde



1457 la kastelo Kenigsbergo iĝis rezidejo de la teŭtonaj grandmajstroj.

Ekde la regado de la grandmajstro Albreĥto la Brandenburga (1511) kaj, precipe, post la sekularigo de la teŭtona ŝtato en 1525, okazis gravaj ŝanĝoj en la arkitekturaj formoj de la kastelo. Jam lia patro Frederiko la Saksa iniciatis rearanĝadon konforme al la renesancaj tendencoj. Malsarena mezepoko cedas al eleganteco kaj modera lukso.

Albreĥto daŭrigis la renovigadon. En la iama grenejo aperis surplanka mozaiiko, gobelinoj ornamis la murojn, volbo estis ornamita kaj ĝi ekservis kiel salono por solenaĵoj. La novkonstruita orienta alo ricevis la nomon “Domo de Albreĥto”, en kiu ekloĝis lia familio, korteganoj kaj servistoj. La fasado similis fortikaĵon kun arkohava turo, trafi sub kiun eblis nur per levebla ponto super la akvoplana fosaĵo. La suda alo estis nura murego. Estis konstruita plafono kaj aranĝitaj loĝejoj por servistoj, sur la supra etaĝo estis aranĝita Standarda Salono, ornamita per kavaliraj ŝildoj kaj standardoj kun la blazonoj de germanaj nobeloj, kiuj en la pasinta kaj tiama tempo partoprenis en la eventoj ligitaj kun Prusujo. La kastela turo situanta aparte kiel grandioza ŝtona gardanto estis ligita per galerioj kun la suda alo kaj la kastela komplekso akiris la aspekton, kiu konserviĝis ĝis la malfeliĉa aŭgusto 1944.

En 1701 princo-elektanto Frederiko III estis kronita en la kastela barokstila kirko kiel la unua reĝo en Prusujo. Post tiam la kirko eknomiĝis la kronkirko. Ankaŭ Frederiko kontribuis al rekonstruado de la kastelo, same kiel la pli postaj regantoj. La kastela turo suferis kelkajn rekonstruojn kaj eĉ kompletan detruon. La finan piramidajn novgotikan aspekton ĝi akiris en la lasta kvarono de la 19a jc. Dufoje dum la tago el la turo sonis himno: je la 11a kaj 21a horoj. Kun la unuaj sonoj el la aĵura pordego sur la turplaceton venis armitaj batalistoj, kun la lastaj sonoj ili foriris. La turo servis ankaŭ kiel gardoturo kontraŭ incendioj. Por averto pri fajro servis specialaj melodioj.

La kastelo travivis diversajn periodojn de la lando: teŭtonan, princan, reĝan, imperian. Ĝi estis multfoje rekonstruata, unuigante diversajn stilojn (gotiko, renesanco, baroko, rokoko). Ĝi povus resti kiel simbolo de la urbo ankaŭ por la venkintoj kaj ties posteuloj. Tio ne okazis. Dum la brita bombardado en aŭgusto 1944 la kastelo estis grave damaĝita, en 1969-1974 la ruinoj estis definitive forigitaj.

Daŭrigota

Dokta kaj delekta, sed ne plu suspekta

Kálmán KALOCSAY, Gaston WARINGHIEN (2–3a eld. Roger BERNARD). *Kiel fariĝi poeto aŭ Parnasa Gvidlibro*. Budapeŝt: Literatura Mondo, 1932. 175 pĝ.


Parnasa gvidlibro. 2a eld., rev. kaj kompl. Warszawa: Pola Esperanto-Asocio en kunlaboro kun “Heroldo de Esperanto”, 1968. 157 pĝ.

Parnasa gvidlibro. 3a eld., rev. kaj kompl. de G. Waringhien. Pisa: Edistudio, 1984. 207 pĝ.

La 1930aj jaroj estis aparte fekundaj por Esperanto, i.a. pro la agado de la budapeŝta eldonejo *Literatura Mondo* kun ties sam-noma revuo (1931–1938) kaj libro-produktado. Ĉi-lastata ampleksis originalan kaj tradukitan beletron, sed ankaŭ lingvo-stabiligajn kaj normo-donajn verkojn kiel: *Plena Vortaro de Esperanto* (PV, 1930), *Lingvo Stilo Formo* (1931), *Enciklopedio de Esperanto* (1934), *Plena Gramatiko de Esperanto* (PG, 1935). Tiuj verkoj estas intime ligitaj al du nomoj: tiu de la hungara medicinisto Kálmán Kalocsay (1891–1976) kaj tiu de la franca filologo Gaston Waringhien (1901–1991).

Al ĉi bazaj kaj klasikaj verkoj pri la lingvistiko de Esperanto aldoniĝas alia kunlabora frukto de la sama duopo, la *Parnasa Gvidlibro* de 1932 (en la dua kaj tria eldonoj de 1968 kaj 1984 kunlaboris alia franco, direktoro de enteriga entrepreno, Roger Bernard, 1907–1997).

Pri kio temas? Kiel PV provis meti ordon en la leksikon kaj PG en la gramatikon de Esperanto, tiel la *Parnasa* celis sisteme prezenti la prozodion de la lingvo. En sia enkonduka balado Kalocsay ironiis: “Ni donas ĉion, krom genio.” La “ĉio” rilatis al la jenaj subfaktoj: metriko (GW), arto poetika (KK), rim-vortaro (GW), poezia fak-vortaro, t.e. kolekto de neologismoj (KK, GW). Eĉ se vi ne estas poeto, sed nur dimanĉa ĝuanto de poezio, certe vi volas scii, kio estas aleksandro, aliteracio, amfibrakto, asonanco, balado, cezuro, glito, heksametro, jambo, pentametro, rondelo, soneto, strofo, stumblo, ŝvebo, tercino, transpaŝo, trokeo k.a. La *Parnasa* kontentigos vian sci-volon, ĉar en sia prozodia traktato Waringhien sisteme



pritraktas ĉion kaj konkretigas per ekzemploj el la Esperanta poezio...

Kiel la aliaj verkoj simil-kategoriaj, ankaŭ la *Parnasa* provokis indignon kaj oponon de la konservativaj esperantistoj kies idealo estis la “tri-groŝa Esperanto”. La ŝtonon de fal-puŝiĝo Waringhien ekulis per jena diro: “Tiuj mal-vortoj estas vera plago por la poezio”. Eble ĉi lingvaj bataloj kaj militoj estas por la nun-tempuloj same ne plu kompreneblaj kiel ŝtiparumo de sorĉistinoj, sed ili ja reale okazis.

La konata brita esperantisto **Montagu Christie Butler** (1884–1970) jene historiis en 1933: “Pri tiu fakvortaro de la bordelo ni decide maldankas”. La “danĝero por nia lingvo” pasis kaj lasis eĉ ne unu vunditon aŭ mortinton. Ĉi “danĝeron” flaris en recenzo aperinta en *Literatura Mondo* ankaŭ la germano **Paul Bennemann** (1885–1954) al kiu Kalocsay mem larĝe respondis kun jena konkludo: “Mia ĉefa celo nuna estis vin konvinki, ke la riĉeco de la poezia lingvo tute ne endanĝerigas Esperanton”. Ankaŭ **Gyula Baghy** (1891–1967) polemike tamburis tian melodion parolante pri “IDO-igo” kaj pri “Desperanto”. Li bezonis longe, ĝis en 1966 lia *Ĉielarko* tute nature adoptis la iamajn danĝeraĵojn...

Kalocsay, sub la pseŭdonimo C.E.R. Bumy (t.e. “cerbumi”) disvolvas en versa formo la poetikan arton. Nevole, ankaŭ li revenas al la neologismoj: “Ekzistas krome kelkaj vortoj malaj, kiujn poeto sentas grize palaj <...>. Eĉ estas mia sento malgraŭvola, ke mal-mola molas pli ol mola.”

La rim-vortaro de Waringhien

aranĝas la vortojn laŭ ties finiĝo kun la licencoj de allaseblaj rimoj. Precipe en la pli vastaj eldonoj de 1968 kaj 1984 tiuj listoj estas ege utilaj, kvankam tute ne elĉerpaj. La poezia fak-vortaro estas nenio alia ol praulo de la *Neologisma Glosaro* de Henri Vatré. La tiama ŝtormo certe estintus malpli violenta, se la aŭtoroj metintus la fontojn: per tio ili pruvus, ke apenaŭ ili inventis, sed ĉefe ĉerpis, kiel estas la tasko de vortaristo. Domaĝe, ke kelkaj vortoj perdiĝis el la postaj eldonoj kaj el aliaj vortaroj, kvankam ili meritis reaktivigon, ekz. *brasi* = bier-fari, el kio deriveblas *brasejo* anstataŭ la plumpa bier-farejo, *brasmajstro*, *braso-domo* k.a. Aŭ: *fikti* = elpensi artan kreaĵon; *friŝtiko* = frumangĝo; *kaputa* = rompita, neuzebliginta; *morilo* = kamenstableto, ferŝtupo; *pakboto* = kurier-ŝipo; *pranzi* = manĝeti inter la du normalaj manĝoj...

En la tria eldono (1984) oni renkontas la jenajn vortojn kiujn la lingvo intertempe senprobleme absorbis: *akĉento*, *albergo*, *bavi*, *brikabrako*, *ĉipa*, *desaponti*, *dista*, *dupo*, *elano*, *espresso*, *flako*, *friska*, *hida*, *jelpi*, *kiĉo*, *knelo*, *koŝmaro*, *krabli*, *lasciva*, *lirli*, *makabra*, *minca*, *noci*, *ostaĝo*, *pelmelo*, *polui*, *rimorso*, *rojo*, *ruro*, *simultana*, *sombra*, *stinki*, *superba*, *ŝriki*, *vigili*, *vrako* k.m.a. La granda stomako de la lingvo voris ilin sen suferi borborigojn, diareon, dispepsion aŭ flatulencan. La lingvo same komencis absorbi la jam-ne-plu-novismojn de Karolo Piĉ (1920–1995), ĉar ili estas nenio alia ol poetapa daŭrigo de la neologisma sistemo antaŭvidita de Zamenhof...

En kio konsistas la valoro kaj signifo de la *Parnasa Gvidlibro*?

1) Ĝi donis al Esperanto, en 1932, utilan laborilon por poetoj kaj tradukantoj.

2) En sia “Arto Poetika” ĝi plu demonstras la spriton kaj humuron de Kalocsay.

3) La rim-vortaro devus refariĝi surbaze de PIV kaj la registrita vortostoko ekster ĝi.

4) La neologismoj de 1932 kaj eĉ de 1984 fariĝis integra parto de la lingvo kaj ĉesis esti dorno en la okuloj de la lingvanoj. La historia evoluo delonge konfirmis, ke valoris la penon rompi lancon por ellaborita leksiko. Ĉi vojon konsekvence pluiris modernaj aŭtoroj kiel Camacho, Fernández, Montagut, Gutierrez, Neves kaj Piĉ, same tradukantoj kiel Diego, Haupenthal kaj Sarasua.

Reinhard Haupenthal



Evelino

de James Joyce

Ŝi sidis ĉe la fenestro kaj spektis la Svesperon invadanta la avenuon. Ŝia kapo estis apogita kontraŭ la fenestraj kurtenoj, kaj en ŝiaj naztruoj estis la odoro de polva kretono. Ŝi estis laca.

Malmultaj homoj preterpasis. La viro de la lasta domo preterpasis survoje hejmen; ŝi aŭdis liajn paŝojn klakantaj laŭ la betona trotuaro kaj poste knarantaj sur la gruzo vojo antaŭ la novaj ruĝaj domoj. Iam estis kampo tie en kiu ili ludis ĉiuvespere kun infanoj de aliaj homoj. Poste viro de Belfasto aĉetis la kampon kaj konstruis domojn en ĝi — ne kiel iliajn etajn brunajn domojn, sed helajn brikajn domojn kun brilaj tegmentoj. La infanoj de la avenuo antaŭe ludis kune en tiu kampo — la Devinoj, la Akvoj, la Brunoj, eta Keo la lamulo, ŝi kaj ŝiaj gefratoj. Tamen Ernesto neniam ludis: li estis tro matura. Ŝia patro ofte rastis ilin hejmen el la kampo per sia prunarba bastono; sed kutime eta Keo gvatis kaj vokis, kiam li vidis ŝian patron venanta. Tamen ili ŝajnis esti iom feliĉaj tiam. Ŝia patro ne estis tiom malbona tiam, kaj krome ŝia patrino ankoraŭ vivis. Tio estis antaŭ longa tempo; ŝi kaj ĉiuj ŝiaj gefratoj plenkreskis; ŝia patrino mortis. Ankaŭ Tinjo Bruno estis morta, kaj la Akvoj revenis al Anglio. Ĉio ŝanĝiĝas. Nun ŝi celis foriri kiel la aliaj, forlasi sian hejmon.

Hejmo! Ŝi rigardis ĉirkaŭ la ĉambro, revidante ĉiujn familiarajn aĵojn, kiujn ŝi senpolvigis ĉiusemajne dum tiom multaj jaroj, scivolante de kie venis ĉiu tiu polvo. Eble ŝi neniam revidos denove tiujn familiarajn aĵojn,

de kiuj ŝi neniam imagis esti apartigita. Kaj tamen dum ĉiuj tiuj jaroj ŝi neniam eltrovis la nomon de la sacerdote kies aĝflava foto pendis sur la muro super la rompita harmoniumo ĉe la kolorigita presaĵo de la promesoj al Benita Margareto Mario Alakoko¹. Li estis lerneja amiko de ŝia patro. Kiam li montris la foton al vizitanto, ŝia patro kutimis doni ĝin, neformale dirante:

— Li estas en Melburno nun.

Ŝi konsentis foriri, forlasi sian hejmon. Ĉu tio estis saĝa? Ŝi provis pesi ambaŭ flankojn de la demando. En sia hejmo ĉiuokaze ŝi havas ŝirmon kaj manĝon; ŝi havis tiujn, kiujn ŝi konis dum sia tuta vivo. Kompreneble ŝi devis labori pene, kaj en hejmo kaj en laborejo. Kion ili dirus pri ŝi en la butikoj, kiam ili ekscios ke ŝi forkuris kun ulo? Diros, ke ŝi estas stultulino, eble; kaj ŝia ofico estos plenigita per reklamo. Sinjorino Gavino estos feliĉa. Ŝi ĉiam kondukis akre, precipe kiam homoj aŭskultis.

— Sinjorino Monteto, ĉu vi ne rimarkas ke tiuj sinjorinoj atendas?

— Pli vigle, sinjorino Monteto, mi petas.

Evelino ne ploras multajn larmojn pro forlaso de la butikoj.

Sed en ŝia nova hejmo, en fora nekonata lando, ne estos tiel. Tiam ŝi estos edzino — ŝi, Evelino. Tiam oni traktos ŝin kun respekto. Ŝi ne estos traktota kiel ŝia patrino. Eĉ nun, kvankam ŝi havis pli ol dek naŭ jarojn, ŝi fojfoje sentis sin en danĝero de la perforto de sia patro. Ŝi sciis ke tio donis al ŝi palpitation. Kiam ili estis

kreskantaj, li neniam atakis ŝin kiel li atakis Henriĉjon kaj Erneston, ĉar ŝi estis knabino, sed lastatempe li komencis minaci ŝin kaj diri, kion li farus al ŝi, se li ne respektus ŝian mortan patrinon. Kaj nun ŝi havis neniun por protekti ŝin. Ernesto estis morta kaj Henriĉjo, kiu okupis sin pri preĝeja ornamado, estis preskaŭ ĉiam ie for en la kamparo. Krome la ĉiama kverelo pri mono sabatvespere eklacigis ŝin terure. Ŝi ĉiam donis sian tutan salajron — sep ŝilingojn — kaj Henriĉjo ĉiam sendis tiom, kiom li povis, sed la problemoj estis akiri iom ajn da mono de ŝia patro. Li diris, ke ŝi malŝparis la monon, ke ŝi havis neniun kapon, ke li ne donos al ŝi sian pene lukritan monon por disĵeti en la stratoj, kaj multe plu, ĉar li kutime estis sufiĉe malbona dum la sabataj vesperoj. Finfine li emis doni al ŝi la monon kaj demandi, ĉu ŝi havis iun intencon aĉeti la dimanĉan manĝon. Tiam ŝi devis elkuri kiel eble plej rapide kaj butikumi, tenante sian nigran ledan monsaketon firme en sia mano dum ŝi kubutumis sian vojon tra la homamasoj kaj revenis hejmen malfrue sub sia ŝarĝo de provizoj. Ŝi pene laboris por bonteni la domon kaj fari, ke la du junaj infanoj, kiujn ŝi prizorgis, iru al lernejo regule kaj ricevu manĝojn regule. Estis malfacila laboro — malfacila vivo — sed nun kiam ŝi baldaŭ forlasotus ĝin, ŝi ne konsideris ĝin kiel tute nedezirindan vivon.

Ŝi baldaŭ esploras alian vivon kun Franĉjo. Franĉjo estis tre bonkora, vira, malferma. Ŝi veturos kun li per la nokta ŝipo por esti lia edzino kaj loĝi

kun li en Bonaero, kie li havis domon atendantan ŝin. Kiel bone ŝi memoris la unuan fojon kiam ŝi vidis lin; li estis loĝanta en domo sur la ĉefa strato, kiun ŝi kutimis viziti. Tio ŝajnis kiel antaŭ kelkaj semajnoj. Li staris ĉe la ĝardeno pordo, lia pinta ĉapo estis puŝita malantaŭen sur lia kapo kaj lia hararo taŭzita antaŭen super la vizaĝo bronza. Tiam ili ekkonis unu la alian. Li kutimis renkontiĝi kun ŝi ekster la butikoj ĉiuvespere kaj akompani ŝin hejmen. Li akompanis ŝin vidi *La Bohemianinon*² kaj ŝi estis ravita dum ŝi sidis en nekonata parto de la teatro kun li. Li ŝategis muzikon kaj kantis iomete. Homoj sciis, ke ili amindumis unu la alian, kaj, kiam li kantis pri la ino kiu amas mariston³, ŝi ĉiam sentis sin agrable konfuzata. Li kutimis nomi ŝin Popenjo por amuzo. Unue estis ekscito por ŝi havi ulon kaj tiam ŝi ekŝatis lin. Li rakontis pri foraj landoj. Li komencis kiel ferdeka knabo, lukranta pundon monate sur ŝipo de la linio Alano⁴ iranta al Kanado. Li diris al ŝi la nomojn de la ŝipoj, sur kiuj li estis, kaj la nomojn de la diversaj kompanioj. Li navigis tra la Magelana markolo kaj li rakontis al ŝi pri la teruraj patagonoj. Li surteriĝis en Bonaero, li diris, kaj venis al la malnova lando nur por ferio. Kompreneble, ŝia patro eksciis pri la amrilato kaj malpermesis ŝin iel ajn paroli al li.

— Mi konas tiujn maristajn ulojn, — li diris.

Iun tagon li kverelis kun Franĉjo, kaj poste ŝi devis renkontiĝi kun sia amanto sekrete.

La vespero pliprofundigis en la avenuo. La blanko de du leteroj en ŝia sino malklariĝis. Unu estis al Henriĉjo; la alia estis al ŝia patro. Ernesto estis ŝia favorata, sed ŝi ŝatis ankaŭ Henriĉjon. Ŝia patro maljuniĝis lastatempe, ŝi rimarkis; li sentos la mankon de ŝi. Fojfoje li povis esti tre afabla. Antaŭ nelonge, kiam ŝi malsane devis ripozi, li voĉlegis al ŝi fantoman rakonton kaj rostis panon por ŝi ĉe la fajro. Alian tagon, kiam ilia patrino vivis, ili ĉiuj ekskursis piknike al la monteto Hoŭtho⁵. Ŝi rememoris sian patron, kiu surmetis la kufon de ŝia patrino por ridigi la infanojn.

Ŝia tempo elĉerpiĝis, sed ŝi daŭre sidis ĉe la fenestro, apogante sian kapon kontraŭ la fenestraj kurtenoj,

enspirante la odoron de polva kretono. Malsupre for en la avenuo ŝi povis aŭdi stratgurdon. Ŝi konis la arion. Strange ke ĝi venis tiun specifan nokton por memorigi ŝin pri la promeso al ŝia patrino, ŝia promeso prizorgi la hejmon kiel eble plej longe. Ŝi memoris la lastan nokton de la malsano de sia patrino; ŝi estis denove en tiu malgranda malluma ĉambro trans la koridoro kaj ekstere ŝi aŭdis melankolian arion de Italio. Al la gurdisto oni donis ses pencojn kaj ordonis foriri. Ŝi rememoris sian patron, pavanta reen en la malsanĉambron kaj diranta:

— Damnaj italoj! Venis ĉi tien!

Dum ŝi kontemplanis, la kompatinda vizio de la vivo de ŝia patrino sorĉis la kernon de ŝia esteco — tiu vivo de ordinaraj oferoj ĉesanta en fina frenezo. Ŝi tremis, dum ŝi aŭdis denove la voĉon de sia patrino diranta daŭre kun stulta insistito:

— Derevaun Seraun⁶! Derevaun Seraun!

Ŝi ekstaris en subita impulso de teruro. Eskapi! Ŝi devas eskapi! Franĉjo savos ŝin. Li donos al ŝi vivon, eble ankaŭ amon. Sed ŝi volis vivi. Kial ŝi devas esti malfeliĉa? Ŝi rajtis esti feliĉa. Franĉjo tenos ŝin en siaj brakoj, volvos ŝin en siaj brakoj. Li savos ŝin.

Ŝi staris en la onda homamaso en la stacio ĉe la Norda Muro. Li tenis ŝian manon, kaj ŝi sciis ke li parolas al ŝi ion pri la vojaĝo denove kaj denove. La stacio estis plena de soldatoj kun brunaj bagaĝoj. Tra la larĝaj pordoj de la ŝirmejoj ŝi videtis la nigran mason de la ŝipo, kuŝanta ĉe la kaja muro, kun lumaj lukoj. Ŝi respondis nenion. Ŝi sentis sian vangon pala kaj malvarma kaj, el labirinto de aflikto, ŝi preĝpetis Dion gvidi ŝin, montri al ŝi ŝian devon. La ŝipo blovadis longan mornan fajfon en la nebulon. Se ŝi iros, morgaŭ ŝi estos en la maro kun Franĉjo, ŝipirante al Bonaero. Ilia vojaĝo estis pagita. Ĉu ŝi ankoraŭ povus retiri sin post ĉio, kion li faris por ŝi? Ŝia aflikto vekis naŭzon en ŝia korpo, kaj ŝi movadis siajn lipojn en silenta fervora preĝado.

Sonorilo bruis sur ŝian koron. Ŝi sentis lin tiri ŝian manon:

— Venu!

Ĉiuj maroj de la mondo spiralis

ĉirkaŭ ŝia koro. Li tiris ŝin en ilin: li dronigos ŝin. Ŝi tenis per ambaŭ manoj la feran balustradon.

— Venu!

Ne! Ne! Ne! Ne eblis. Ŝiaj manoj tenis la feron en frenezo. Inter la maroj ŝi sendis krimon de angoro.

— Evelino! Evenjo!

Li kuris trans la barilon kaj vokis ŝin, ke ŝi sekvu. Li estis krie ordonata iri antaŭen, sed li ankoraŭ vokis ŝin. Ŝi turnis al li sian blankan vizaĝon, pasiva, kiel sendefenda besto. Ŝiaj okuloj donis al li neniun signon de amo nek adiaŭo nek rekono.

Tradukis Russ Williams

Notoj

1. **Margareto Mario Alakoko** (Marguerite Marie Alacoque, 1647–1690). Franca romkatolika monaĥino, viziulino, fondinto de la kulto Sankta Koro de Jesuo, akceptita de la romkatolika eklezio en 1765.

2. **La Bohemianino**. La plej konata opero (1843) de la irlandia komponisto kaj operkantisto Michael William Balfe (1808–1870). Ĝi estas konata ankaŭ kiel *Ciganino*.

3. **... li kantis pri la ino kiu amas mariston ...** Probable temas pri *Amikino de maristo* de Charles Dibdin (1745–1814), angla komponisto kaj aktoro, aŭtoro de centoj da maristaj kanzonoj.

4. **linio Alano** (Allan Line). Ŝiplinio liganta Anglion kun Kanado kaj Usono.

5. **Monteto de Hoŭtho** (Hill of Howth). Nealta monto ĉe la Dublina Golfo.

6. **Derevaun Seraun!**. Ĉi tiuj irlandecaj vortoj estas malsame klarigataj de diversaj komentariistoj, ekzemple, “ĉiu plezuro finiĝas per doloro”.

Pro ĉi tiu traduko Russ Williams, usonano loĝanta en Pollando, iĝis laŭreato de la literatura konkurso *Liro-2007* en la branĉo *Traduka prozo el la angla lingvo*.





Dankon, mi nepre kunvojaĝos

Jacques Yvart. *Invito por vojaĝo*. — **Donneville: Vinilkosmo, 2008.**

La francdevena kaj internacie renoma “franca trobadoro” Jacques Yvart, aŭ “Ĵakvo” kiel li sin nomis, estas konata en Esperantujo dum pli ol dek jaroj, post kiam aperis lia kantata kolekto de Georges Brassens. En sia 26a (kaj dua en Esperanto) albumo Ĵakvo evoluigas sian ŝatatan temon — vojaĝadon. La titolo de la albumo kaj unu el la kanzonoj kun ties teksto prenitaj el la poemo de Bodlero (ruslandanoj konas kanzonon je la sama teksto en la albumo de Tuĥmanov *Sur la ondo de mia memoro*).

Invitite, ni kun intereso sekvas lian senhastan kaj atentigan baladan vojon tra humoroj kaj animaj travivaĵoj, envolvate de lia raŭketa forta voĉo, mema gitarludo kaj iomo da aldonaj instrumentoj ludataj de liaj amikoj.

Plejparton de la kanzonoj aŭtoras, muzike kaj tekste, li mem, krom tiuj far, ekz. Johnny Cash. Dekomence, la muzikaj aranĝoj melodie kaj harmonie, senriproĉe ĝustaj, ŝajnas tro “simplaj”, atendataj, sed iam surprize freŝaj. En stilo balada kaj iam “popa” ludatas gitaroj, piano, violonoj, buzuko, drumo kaj baso. Ofte ni aŭdas aldone lian aŭ inaniman voĉon. Laŭgrade, precipe kun la impresoj de la kanzontekstoj, kvazaŭ pli recitataj ol kantataj, vi trovas ĉion kohera kaj prave ĝusta. Vi komprenas, kiom gravas ĉi muziko por Ĵakvo mem, kaj vi aliĝas al liaj sentoj kaj ideoj, demandoj kaj revoj — pri eterna amo, libero, la vanta mondo kun ties belegajoj, paco — ĉu ebla?.. Kaj Ĵakvo mem estas senfine fascina kaj korĉarma, trankvila sed ribelma kaj amikema.

La albumo estas eldonita en bela kombinaĵo flavnigra, fajne kaj senerare printita, kun ŝajne jam neeviteblaj karaokoj kaj agrabla aldono videa.

Andrej Peĉonkin

Mornaj tagoj en Concarneau

Simenon, Georges. *La flava hundo: Krimromano* / Trad. el la franca Daniel Luez; Antaŭpar. Aleksander Korĵenkov. — **Kaliningrado: Sezonoj, 2007.** — 120 pĝ. — (Serio *Mond-literaturo*; Vol. 14).

En novembro la vivo en la franca havena urbo Concarneau okazas endome: *Estas alta fluso, kaj ŝtormo el la sud-oriento kunbatas la barkojn en la haveno. La vento enŝoviĝas en la stratojn, kie iam vidiĝas paperpecoj rapidege flugantaj ternivele. Jen! Iu forlasas la kafejon. Deĵoranta doganisto observas, ke li estas gaja, necerta sur siaj gamboj kaj ke li kantetas. La viro volas fumi kaj komenciĝas komika lukto inter la ebriulo, lia mantelo kiun la vento volas forŝiri de li, kaj lia ĉapelo, kiu fuĝas laŭlonge de la trotuaro. Subite la fumanto ŝanceliĝas, kroĉas sin al la pordanoso. Komika epizodo dum la nokto. Pasas unu minuto, du minutoj. Nova ekrigardo al la ebriulo, kiu ne moviĝas. Male, hundo, veninta de ie ajn, estas tie kaj ekflaras lin. Okazis atenco!*

Kiu volas ataki homon, kiu estas, laŭ la atesto de siaj amikoj, *la plej bona tipo sur la tero, krom tio, ke li terure timegas sian edzinon?* Dum Maigret enketas kaj pridemandas la eminentulojn de la urbo, jam okazas alia strangajo. *Doktoro Michoux, kiu apenaŭ malpremis la dentojn, kliniĝis por rigardi sian glason kontraŭ lumo. <...> Li proksimiĝis la glason al siaj naztruoj, trempis en ĝin unu fingron, kiun li tuŝetis per sia langofino. Kontrolinte la botelon, Maigret ekvidis du aŭ tri etajn blankajn grajnojn flosantajn sur la likvaĵo — striknino.*

Ankoraŭ ne sufiĉas. Unu tagon poste malaperas loka ĵurnalisto. *Lia aŭto estas retrovita sangoplena, ne malproksime de lia hejmo. Jam antaŭ tiu malkovro gazeto ricevis raporton pri la eventoj, tute taŭgan por semi panikon en Concarneau.* Kaj paniko efike ekestas en la eta komunumo. Kaj kial la flava hundo ĉiam estas proksime al la sceno de ĉiu krimo?

Tiom da demandoj. Kaj kion faras Maigret? Li transdonas la esploron al juna nesperta inspektoro kaj pasigas la tempon en la kafejo kun la gastoj tie. La urbestro serioze malpacienas kaj postulas, ke Maigret ĉasu la kulpanton pli aktive. Li povus almenaŭ aresti iun. Ŝajne Maigret nur observas... *Sed li havis la certecon, ke la dramo nur komenciĝis. Por koni ties ŝnurojn,*

necesis ebligi al ĝi disvolvi sin laŭeble evitante damaĝojn.

Kompreneble, Maigret jam solvis la misteron, sed li bezonas tempon por pruvi ĝin. Kaj li faras tion per sia propra metodo. *Precipe pri tiu afero, en kiu metodo estas havi neniun metodon. <...> Demando pri atmosfero ... Demando pri kapoj. Kiam mi venis ĉi tien, mi tuj trovis kapon, kiu plaĉis al mi kaj mi ne plu lasis ĝin.*

Tiu libro aperis en la jaro 1931. La titolo ludas kun la trivialaj samtempaj titoloj, kies legadon ni nun ne plu povas kaj volas elteni. Simenon konas homajn rilatojn, kaj pro tio *La flava hundo* pli ol 75 jarojn post ĝia unua apero ankoraŭ meritas nian atenton.

La traduko de Daniel Luez ŝajne (mi ne kontrolis) sekvas fidele la francan sintakson. Foje mi deziris iom pli liberan aliron al la teksto por altigi la fluecon de la legado. Kompreneble tio ne estas kritiko de la traduko, kiu ja bele respegulas la originalon. (la teksto en kursivo ĉi tie citas la tradukon.)

Notoj kaj klarigoj kompletigas tiun novan pliriĉigon de nia literaturo el Kaliningrado.

Mi devintus skribi tion ĉi antaŭ kelkaj monatoj, sed la cirkonstancoj malhelpis. Mi legis tiun libron por la unua fojo, kiam streĉo, por ne diri ĥaoso, regis mian laborsituacion. Kun la *flava hundo* mi povis senstreĉiĝi, kvazaŭ feriante en Concarneau, urbo, kiu ankaŭ havas sian belan flankon.

Cetere, oni ne povintus diri kial, la malstreĉo estis ĝenerala. Eble kaŭzis tion la vetero, kiu subite fariĝis bona. La ĉielo ŝajnis freŝe lavita. Ĝi estis blua, pale blua, sed vibra, en kiu trembrilis leĝeraj nubetoj. <...> Nu, sufiĉas unu sunradio por transformi Concarneau, ĉar tiam la muroj de la malnova urbo, malgaja sub la pluvo, alprenas ĝojan, brilegan blankan koloron...

Ankaŭ vi feriu tie.

Wolfgang Kirschstein



La unua flavhunda filmo (de Jean Tarride) kun Abel Tarride kiel Maigret aperis jam en 1932. Sekvis pliaj versioj, inkluzive de la ruslingva *Ostaĝoj de timo*.



Literatura konkurso Liro-2008

La Ondo de Esperanto denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso *Liro-2008*.

Liro-2008 havas kvin branĉojn:

1. Originala prozo
2. Originala poezio
3. Traduka poezio: *Друзьям* de Pjotr Vjazemskij
4. Traduka prozo (el la rusa): *Бемоль* de Valerij Brjusov
5. Traduka prozo (el la angla): *Aloha Oe* de Jack London

En la branĉoj 1–2 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Sendu kvar tajpitaĵojn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ 15 okt 2008.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn ankaŭ rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso sezonoj@yahoo.com. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La tekstoj de la tradukendaj verkoj estas elŝuteblaj ĉe: <http://Esperanto.Org/Ondo>.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2008. La organizanto ĝis 1 jan 2011 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

Sukcesojn!

Halina Gorecka
sekretario de *Liro-2008*

Ricevitaj libroj

Japana eseero, №3 / Red. Syōzi Keiko. — Tokio: Libroteko Tokio, 2003. — 110 pĝ. — [Donaco de Hori Jasuo].

Marček, Stano. *107 krucenigmoj en Esperanto* / Il. Stano Markovič, Linda Marčeková. — Martin: Stano Marček, 2008. — 88 pĝ., il. — [Donaco de Stano Marček].

Hori Jasuo. *Raportoj el Japanio*, №8. Januaro-December 2004. — Tokio: Libroteko Tokio, 2005. — 190 pĝ., il. — [Donaco de Hori Jasuo].

Булгаков, Михаил. *Роковые яйца. Записки юного врача. Записки на манжетах. Рассказы*. — М.: АСТ; ВЗОИ, 2004. — 352 с.; 10000 экз. — [Aĉeto].

C.256–262. Самогонное озеро [Esperantisto rolas].

Ниemi, Микаэль. *Популярная музыка из Виттулы: Роман* / Пер. с швед. Р. Косынкина. — М.: Текст, 2003. — 269 с.; 3500 экз. — [Aĉeto].

[La du protagonistoj konas Esperanton, kun pluraj ekzemploj].

Эсперанто — наилучшая пропедевтика (по материалам Международной конференции в Москве 13 апреля 2007 г.) = Esperanto — la plej bona propedeŭtiko (laŭ la materialoj de Internacia Konferenco en Moskvo la 13-an de aprilo 2007). — М.: Европейский университет Justo, 2007. — 152 с.; 1000 экз. — [Aĉeto].

Ricevitaj gazetoj

Esperanta Finnlando. 2008/2; Esperanto. 2008/4; Esperanto aktuell. 2008/2; Heroldo de Esperanto. 2008/4,5; La Gazeto. 2008/136; La Merkato. 2008/95; La Movado. 2008/685,686; La Ondo de Esperanto. 2008/5; La Revuo Orienta. 2008/3; La SAGO. 2008/42; Literatura Foiro. 2008/232; Monato. 2008/4,5; Norvega Esperantisto. 2008/2; Scottish Esperanto Bulletin. 2008/1; Service du Presse. 2008/42.

Aperintaj en 2007

Ĉiukajere ni listigas ricevitajn gazetojn. Entute, *La Ondo* ricevis interŝange aŭ donace 285 eldonojn de 62 gazetoj, eldonitaj dum 2007. Inter ili plej ofte aperis *Heroldo de Esperanto* — 17-foje, ĝin sekvas japana *La Movado* kun 12 kajeroj, sekvas *Esperanto*, *La Revuo Orienta*, *Monato*, *Sennaciulo* kaj nia *Ondo* kiuj venis 11-foje (po unu duobla). Plej multaj (16) estas dumonataj periodaĵoj, inter kiuj estas ĉefe asociaj organoj kaj kulturaj gazetoj. Trimonataj estas ok gazetoj. Aliaj aperis malpliofte aŭ ne-regule.

La plej multaj gazetoj venis al ni el Francio (9). Sekvas Svislando kaj Nederlando (5); Hispanio kaj Ruslando (4); Britio, Germanio, Japanio, Pollando (3); Ĉeĥio, Finnlando, Kroatio, Litovio, Usono (2). Po unu gazeto venis el Aŭstralio, Aŭstrio, Brazilo, Bulgario, Ĉinio, Danlando, Estonio, Hungario, Italio, Kanado, Koreio kaj Norvegio.

Laŭ la temaroj estas jena divido:

Ĝeneralaj magazinoj (2): *Monato*, *Kontakto*.

Internaciaj movadaj (4): *Esperanto*, *Heroldo de Esperanto*, *La Ondo de Esperanto*, *TEJO-Tutmonde*.

Kulturaj (4): *Beletra Almanako*, *La Gazeto*, *La KancerKliniko*, *Literatura Foiro*.

Religiaj (2): *Frateco*, *Spiritisma Esperanto-Informilo*.

Politikaj kaj sociaj (5): *Internaciisto*, *La SAGO*, *Sennacieca Revuo*, *Sennaciulo*, *Femina*.

Por infanoj kaj komencantoj (2): *Juna Amiko*, *Komencanto*.

Fakaj (7): *Antaŭen*, *Aŭstria Fervojisto*, *Informilo por interlingvistoj*, *Informilo de AEH*, *La Merkato*, *Mikrofone*, *Scienco kaj kulturo*.

Aliaj, plejparte, asociaj organoj landaj kaj lokaj (34).

Dankon al la redakcioj, kiuj sendas al ni siajn gazetojn!

HaGo



Por la aprila tasko *Nur radikoj* venis sep respondoj. Tute ĝustajn sendis Malcolm Jones (Britio), Zbigniew Tyłkowski (Pollando) kaj Jurij Kivajev (Ruslando).

La ĝusta respondo: G – 5, T – 8, Z – 2, L – 5.

Horizontale: 1. gigant’; 2. plezur’; 3. dezert’; 4. lateks’; 5. river’; 6. kartoĉ’; 7. balast’; 8. padus’; 9. rempar’; 10. negliĝ’; *Vertikale:* 1. gepard’; 2. pergol’; 6. kultur’; 7. baston’; 12. torent’; 14. rimors’; 15. zefir’; 16. tegol’; 18. ĉapitr’. 20. tordiĝ’. *Oblikve:* ĉapel’.

La loto donis libropremion al **Jurij Kivajev**. Gratulon!

Sudoku

Sudoku estas japana enigmo populara en la tuta mondo. Necesas plenigi la kampon per ciferoj de 1 ĝis 9 tiel, ke en ĉiu horizontala kaj vertikala linio kaj en kvadratoj 3×3, la ciferoj ne ripetiĝu. La respondojn bonvolu sendi al la redakcio antaŭ la 1a de aŭgusto poŝte aŭ rete.

Kompilis **Aleksej Korĵenkov**

2						6		
	7	8			9			
3	4	6		2				
6					1	3		
8			4		2			6
		4	8					7
					1	9	4	2
				2		1	6	
		9						8

Saĝa rabeno

La tre ortodoksa israela rabeno Josef Ŝlomo Kahanman (1886–1969) veturis kelkfoje al eksterlando por kolekti mondonacojn ĉe riĉaj judoj por konstrui religiajn lernejojn.

Foje li venis al usona urbo, en kiu loĝis tre tre riĉa judo. Li esprimis deziron viziti lin sed oni avertis lin: “Vi malŝparos vian tempon. Li estas tre kontraŭreligia judo, kiu neniu groŝon donacos al vi”.

Rabeno Kahanman tamen venis al la hejmo de l’ riĉulo, afablege parolis al li kaj petis monon por konstrui novan lernejon en la religiula urbo Benej-Berak.

— Edukado de judoj estas grava por vi, ĉu ne? — li demandis la riĉulon.

— Certe! — la riĉulo diris kun rideto. — Mi ĉiam ĝojas subteni edukadon. Mi pretas donaci la tutan monon bezonatan por konstrui tiun ĉi lernejon, sed mi havas kondiĉon: ke la lernantoj ne rajtos porti kapkovraĵon, eĉ ne dum la preĝado.

La rabeno mirinde konsentis.

Post unu jaro kaj duono la riĉa judo, kiu donacis la promesitan sumon, ricevis invitilon al la inaŭguro de la nova religia lernejo. En la supro de la folio aperis la jena titolo: “Invito al la inaŭguro de elementa lernejo por knabinoj”.

El la kolekto de **Josef Shemer**

Spritaĵaj splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Punkaj esploroj, sed ne en baroj

... havi komisionon, kiu esploru ĉi tiun “eksterajn” vidpunkojn... estas ĉefa paŝo por efike malstarigi barojn por la E-a disvastigado. (Luis I. Raudón Uribe, 26 jul 2007, <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/3371>)

Televideo en tombejo? (Ĉu Vivendi aŭ Mortendi?)

... nebanala akuzo... fariĝis la temo de 27-minuta dokumenta filmo produktita de Capa kaj dissendita de la kriptaj kanalo de Vivendi Universal. (“Kripta koto, Traktado de José Bové fare de amaskomunikiloj”, Serge Halimi, <http://eo.mondediplo.com/article680.html>)

Kion enhavas fakulo

... mankas fakuloj kiuj ... kapablas fari tutan programon kun sia detala enhavo. (“Aliaj fakuloj mankas”, reago de Dennis Keefe, *Libera Folio*, 5 feb 2008, <http://www.liberafolio.org/2008/raportomaalouf>; rimarkis Ionel Onet)

Kion enhavas fakulo 2: Ĉu kakofonie?

François Grin (2006) Instruado de la fremdaj lingvoj: Ekesploro per la analizo de politikoj, kak sekvoj por esperanto, Prelego prezentita okaze de la Universla [tiele. — I.E.] Kongreso de UEA. En Florenco, la 30-an de julio 2006. (http://www.unige.ch/eti/elf/news_pub.html)

Intima horzonozo?

Dank’ al la spaco kaj la libera tempo ni povis multe amiĝi unu kun la aliaj laŭ la barata tempo. (Hori Yasuo pri la 5a Azia Kongreso, 27 feb 2008, <http://groups.yahoo.com/group/individuj-membroj/message/742>)

Ekzempl(er)a lingvouzo

... fek ekzemplerojn [de “La mastro de l’ ringoj”. — I.E.] estis vendinaj. (Aleksander Korĵenkov, 28 sep 2007, <http://groups.yahoo.com/group/uea-membroj/message/10656>; rimarkis Kalle Kniivilä kaj Claude Nourmont)

Eraro sen kamparo

La baldaŭa paralela ŝanĝo sur la supraj etaĝoj politikaj en Usono kaj Ruslando provokas al kamparo rilate la gradon de tiu paralelismo. (Alen Kris. [Komentario] // *La Ondo de Esperanto*, 2008, №4, pĝ 2.)

Hindo kaj kubano traktis brazilan monon

Dum la kunveno, ambaŭ gvidantoj interŝanĝis informojn pri la respektivaj landoj kaj ties realojn. (“Rahul Gandhi kaj Felipe Pérez Roque kunsidas en Havano”, dissendolisto de Esperanto@ain.cu, 3 jul 2007)

Duobla subteno

La konferencanoj subtenis la diversajn diskutojn kiuj celis subteni la ideon... (*Eŭropa Bulteno*, dec 2006)

Plukis **István Ertl**

Vizitu la urbojn de Koperniko

26 jun – 2 jul 2008 okazos en Olštino (Pollando), la ĉefurbo de Varmio kaj Mazurio, Frusomera Renkonto de Esperantistoj Ŝatantaj Olštinion (FREŜO). Dum ĝi oni povos partopreni Esperanto-kvizojn kun valoraj premioj, aŭskulti diverstemajn prelegojn, ripozi ĉe lagoj kaj en la apudolština arbarĝardeno, ĝui artajn programerojn kaj ekskursi en Frombork.

(Fotis Adam Frenszkowski)



La urboj Olštino kaj Frombork estis ligitaj kun la vivo kaj agado de la fama astronomo Nikolao Koperniko. En la olština gotika kastelo troviĝis sidejo de la administranto, kiu samtempe plenumis rolon de juristo, kuracisto, ekonomo. En la jaroj 1516–1521 administris ĉi tie Nikolao Koperniko. Krom tio li okupiĝis pri astronomiaj esploroj. Li observis la Sunon kaj planedojn.

Ĝis nun en la olština kastelo oni povas vidi fragmenton de ekvinoksa tabelo, kiun li faris.

Pri la restado de Koperniko en Olštino memorigas du monumentoj apud la kastelo.

Ekde 1497 Koperniko estis kanoniko de la varmia kapitulo kaj la lastajn jarojn de sia vivo li pasigis en la urbeto Frombork, kie li mortis en 1543. Tie li daŭrigis observojn de la ĉielo. Siajn esplorojn li priskribis en sia ĉefverko *De revolutionibus*. Lia loĝejo situis en la turo staranta vid-al-vide al la enirejo de la katedralo.

Dum la ekskurso en Frombork ni vizitos ĝiajn ĉefajn vidindaĵojn: la imponan gotikan katedralon, Kopernikomuzeon en la barokstila episkopa palaco, la turon en kiu troviĝis la loĝejo de la astronomo, la sonorilturon de kiu etendiĝas pitoreska panoramo al la Vistula enfluejo.

En 1973, okaze de la kvincenta naskiĝdatreveno de Koperniko, en Olštino estis malfermita planetario kun 200 sidlokoj. Ĉiujare la prezentaĵojn en ĝi rigardas miloj da spektantoj. Antaŭnelonge la planetaria aparataro estas renovigita, kaj nun ĝi estas unu el la plej bonaj en Pollando. La programo de FREŜO enhavas viziton de la planetario.

Petu pliajn informojn poŝte (Elżbieta Leonowicz-Frenszkowska, PL 10-684 Olsztyn, ul. Orłowicza 35 m. 5, Pollando) aŭ rete (efrenszkowska@wp.pl).

Elżbieta Leonowicz-Frenszkowska



La planetario en Olštino (Fotis Adam Frenszkowski)



Venu al la

16-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo

La 4–11-an de oktobro 2008
en Salou (Hispanio)

luis_serrano@mixmail.com

<http://personales.ya.com/semajno>



Malgraŭ la grandaj problemoj en la landoj de la eksa Jugoslavio la movado persistas kaj kelkloke bone progresas. Ankaŭ en Serbio, kie komence de majo okazis la unua kongreso de serbiaj esperantistoj (vd. pĝ. 6). Tamen oni povas vidi en la supra foto, ke, bedaŭrinde, inter la aktivuloj estas tro malmultaj gejunuloj. (Fotis Dimitrije Janičić)



Post dek sukcesaj konkursoj (1998–2007) la redakcio de *La Ondo de Esperanto* invitas al partopreno en la 11a Internacia Fotokonkurso. Rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15×20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La fotoj devos atingi la sekretarion de la konkurso antaŭ la 1a de decembro 2008.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas) de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

Juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1. 50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2009.
2. 25 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2009.
3. abono de *La Ondo de Esperanto* en 2009.

Speciala premio (50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto*) por la plej bona foto pri la temo *Vizaĝoj*.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita en *La Ondo de Esperanto*. La organizanto de la konkurso havos ĝis la 31a de decembro 2010 ekskluzivan rajton uzi la ricev-itajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj. Poste la publikigo-raĵton havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj.

***Supre estas foto “Reveno al la hejmo” de Gediminas Kaslauskas (Litovio)
(3a premio en la naŭa fotokonkurso)***